

Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

104-a jaro • n-ro 1251 (10) • **Oktobro 2011**

La 42-a Internacia Infana Kongreseto



**Kion faris la
strategia komisiono**

**Unuiĝintaj
Nacioj**

**Retrorigarde
al la 96-a UK**

Esperanto

Oficiala organo de

Universala Esperanto-Asocio

(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎ +421 43 4222 788
✉ revuo.esperanto@gmail.com;
redakcio@gmail.com

Aperas:
en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 120 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 38);
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 4,00.

Anoncarifto (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550,
1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%.
Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas
duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe ING-bank,
Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL72INGB0000378964
BIC: INGB NL2A)
42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank,
Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
(IBAN: NL66ABNA0426051599
BIC: ABNA NL2A).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando

☎ +31-10-436-1044,
✉ +31-10-436-1751, ✉ uea@co.uea.org

TTT: www.uea.org

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Enhavo

- 195 ... Malferme: Kion faris la strategia komisiono post la UK en Kopenhago (Loes Demmendaal)
- 196 ... Retrorigarde al la 96-a UK: Inaŭgura parolado de la Prezidanto (Probal Dasgupta)
- 197 ... Internacia Scienca Asocio Esperantista sin renovigas (Francesco Maurelli)
- 198 ... UEA honorigis, premiis kaj diplomis
- 199 ... Tutmonda, facila kaj regula (Renato Corsetti)
- 200 ... Internacia Infana Kongreseto: Infane vikingis 1 dano kaj 38 eksterlan-danoj (Adenjo Charrière)
- 201 ... De la 41-a UK al la 42-a IIK: Jubileo de la Internacia Infana Kongreseto (Adenjo Charrière)
- 202 ... Unuiĝintaj Nacioj: Interŝtata organizaĵo. Mallonga enkonduko en la strukturon de la UN-familio de organizaĵoj (Humphrey Tonkin)
- 204 ... UN kaj Unesko (Rob Moerbeek)
- 205 ... Festotago honore al Claude Gacond (Mirejo Grosjean); Navige tra TTT-paĝoj (Marek Blahuš)
- 206 ... La regionaj komisionoj de UEA per siaj fondaĵoj diskonigas kaj instruas Esperanton (Loes Demmendaal)
- 207 ... Recenzoj: Luiza Carol pri *La Eta Princo*
- 208 ... Nora Caragea pri *Rakontoj sub la lito*. UEA ricevis saketojn, sakojn, skatolojn kaj albumojn (Loes Demmendaal)
- 209 ... Laste aperis
- 211 ... Oficiala informilo; Kotiztabelo de UEA por 2012
- 212 ... Partizánske: Ĉu plia Esperanto-urbo? (Marek Blahuš); Kongreso de Esperanto en Italio (Francesco Maurelli)
- 214 ... Forpaso; Anoncetoj

KOVRILPAĜE: 32 infanoj kaj 7 gvidantoj el 15 landoj lernis pri vikingoj kaj amuziĝis dum la 42-a Internacia Infana Kongreseto en Hundested, norde de Kopenhago (legu pli sur la p. 200). La infanoj venis al la solena fermo de la 96-a UK por saluti la kongresanojn. Foto: Joaquim J. Mariano.

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (kunordigo, ĝenerala planado): Prof. Probal Dasgupta, LRU, Indian Statistical Institute, 203 B.T. Road, IN-700108 Kolkata, Barato;
☎ +91 33 2484 8529;
✉ probal53@yahoo.com.

Vicprezidanto (kulturo, kongresoj, edukado): S-ino Claude Nourmont, 2 Om Kläppchen, LU-5682 Dalheim, Luksemburgo; ☎ +352 23 66 88 64;
✉ moonmont@pt.lu.

Ĝenerala Sekretario (informado): S-ino Barbara Pietrzak, Ul. Między-narodowa 38/40a m 217, PL-03-922 Warszawa, Pollando; ☎ +48 22 252 79 21 [h], ☎ +48 6000 51 425;
✉ bpietrzak@onet.eu.

Financo, administrado, TEJO: S-ino Loes Demmendaal, Duikerlaan 160,

NL-2903 AC Capelle aan den IJssel, Nederlando; ☎ +31 10 213 33 20;
✉ l.a.demmendaal@planet.nl.

Landa kaj regiona agado: S-ino Maritza Gutiérrez Gonzáles, Avellaneda 212, e/ Gertrudis y Josefina, CU-10500 Habana, Kubo; ☎ (of) +53 7 6489201, (h) +53 7 6498729; ✉ mglez@enet.cu

Scienca kaj faka agado: Prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71799 Modiin, Israelo; ☎ +972 544 548712; ✉ amri@huji.ac.il.

Eksteraj rilatoj: S-ro Stefano Keller, Case postale 6034, CH-1002 Lausanne, Svislando; ☎ +41 76 261 06 09;
✉ kellerstefano@gmail.com.

Observanto de TEJO: Nico Huurman.

Observanto de ILEI:
S-ro Stefan MacGill.

Kion faris la strategia komisiono post la UK en Kopenhago

Ni feriiis, sed ne nur. Inspirite de la Strategia Forumo kaj la dumkongresaj kunsidoj ni komencis pridiskuti, ĉu aldoni al la tri eroj de niaj agadkampoj (konsciigo, kapablo, kunlaborado kaj kunordigo) ankoraŭ kvaran, nome aplikadon/kulturadon.

Ni ankoraŭ ne venis al la decido, ĉu efektive proponi la kvaran agadkampon, kaj se jes, kiel nomi ĝin. Tamen multaj partoprenantoj en la Strategia Forumo menciis la kulturen interŝanĝon kiel la ĉefan eron de sia esperantisteco. La longdaŭra perspektivo de la celoj kvazaŭ malfaciligas labori pri ili. Ekzemple unu el la ĉefaj agadkampoj por UEA estas la konsciigo, pri kio la komisiono skribis:

- Ni sekvas kaj dokumentas demandojn de lingva justeco en la mondo, kaj peras informojn pri problemoj kaj solvoj;
- Ni instigas, iniciatas kaj subtenas esplorojn, diskutojn kaj debatojn pri lingva justeco kaj ĝia rilato al aliaj gravaj sociaj celoj;
- Ni disvastigas informojn pri la internacia lingvo Esperanto, pri ĝia uzado en interkultura komunikado kaj kunlaboro, kaj pri ĝia rolo en la streboj al lingve pli justa mondo.

Belaj vortoj, belaj celoj. Sed kiel atingi ilin? Kaj kion fari por ke ni, UEA, atingu tion? De vizio, misio kaj agadkampoj necesas do transiri al laborplano. Laborplano por limigita tempo kun atingeblaj rezultoj. Ni do komencis diskuti pri kion ni ŝatus atingi ene de la venontaj kvin jaroj. La ĉefaj kriterioj estas specifaj, mezureblaj, ambiciaj, realigeblaj, tempolimigitaj. Sekve ni do limigis nin al listo de tri konkretaj prioritatoj sur ĉiu agadkampoj, por realigo en la venontaj kvin jaroj. Jen kelkaj proponoj pri konsciigo de komisionoj por atingi tion:

Post 5 jaroj estu:

- Tre multlingva retpaĝaro kun ampleksaj informoj pri Esperanto kaj ĝia rilato al pli vastaj demandoj de lingva justeco kaj pli paca kaj daŭripova mondo;
- Memadministrata reto de kelkcent inform-aktivuloj, kunordigata kun la landaj asocioj kaj regionaj komisionoj;
- Ekstera financado por evoluigi kaj diskonigi indeksojn pri lingva justeco (kunlabora projekto kun diversaj universitataj esplorgupoj k.s.).



Alia komisionano skribis:

- Kreado de almenaŭ 30-lingva retpaĝaro de UEA pri Esperanto (nu, almenaŭ ĉiuj lingvoj kun almenaŭ 50 milionoj da parolantoj) kaj kiu havu almenaŭ kvaroblon de la nunaj vizitantoj al la nuna esperanto.org;
- Aperoj de Esperanto en televido almenaŭ 500-foje dum la jaro en la mondo;
- Aperoj de almenaŭ 3 akademias studoj jare favoraj al Esperanto, laŭeble el diversaj kampoj (ekonomiko, lingvistiko, sociologio, politikaj sciencoj...)

La tria proponis:

- Multlingva retpaĝaro rilate demandojn pri lingva justeco, problemoj kaj solvoj (uzebla por esperantistoj kiel bazo por informado);
- CED (kaj Centro Nitobe) organizu almenaŭ ĉiun trian jaron konferencon pri lingva justeco kaj rilate al aliaj gravaj sociaj celoj;
- Multlingva retpaĝaro kun ampleksaj informoj pri Esperanto kaj ĝiaj Movado kaj kulturo.

Kompreneble ni povas menciigi multajn aliajn vojojn por atingi konsciigon pri lingva justeco kaj la solvo kiun Esperanto povas doni. Sed se fokusi al specifaj, mezureblaj, ambiciaj, realigeblaj, tempolimigitaj projektoj, la ŝanco de sukceso estos pli granda. Ni ankoraŭ ne findiskutis pri niaj proponoj, sed mi povus imagi ke UEA montros estonte al vi la jenan liston:

- ✓ 2013 Tre multlingva retpaĝaro kun ampleksaj informoj pri Esperanto kaj ĝia rilato al pli vastaj demandoj de lingva justeco kaj pli paca kaj daŭripova mondo (uzebla por esperantistoj kiel bazo por informado);
- ✓ 2014 CED (kaj Centro Nitobe) organizu almenaŭ ĉiun trian jaron konferencon pri lingva justeco rilate al aliaj gravaj sociaj celoj;
- ✓ 2015 Aperoj de Esperanto en televido almenaŭ 500-foje dum la jaro en la mondo;

Por ĉiuj agadkampoj ni faros liston kun 3 prioritatoj. Por tiuj 9-12 prioritatoj ni bezonos viajn entuziasmon, kapon, manojn kaj kunlaboron.

Loes Demmendaal



Retrorigarde al la 96-a UK

Inaŭgura parolado de la Prezidanto

Sinjorinoj kaj sinjoroj,

Ni estas en Kopenhago, kiun la sekvantoj de la primedia debato eble plej reliefe konas kiel ejon de la monda diskuto cele al ekvilibro inter la diversaj respondecoj por savteni la ekziston kaj kvaliton de la homa vivo. Kongresante en tiu ĉi Kopenhago, ni celu la ekvilibron. Por plialtigi la nivelon de niaj laboroj, ni bezonas aparte energie celi la egalpezon en la lingva sfero.

Kiel vi ĉiuj scias, estas delonge severe malsimetria la tutmonda trafiko de tradukitaj tekstoj. Multege pli da verkoj el la landoj de la geopolitika “nordo”, gvidata de la “okcidento”, tradukiĝas suden, ol sudaj verkoj norden. Pro tio donas al mi grandan ĝojon povi raporti al vi, ke grava vjetnama epopeo de la poeto Nguyen Du, esperantigita de Le Cao Phan sub la titolo *La Rakonto pri Kjeŭ*, estas nun polurita kaj prespretigata pro iniciato de internacia amikaro.

Ĉu la plej grava aspekto de tiu ĉi atingo estas la interpersona kamaradeco, al kiu ni dankas la pretiĝon de tiu priferinda teksto? Aŭ la eblo utiligi tiun ĉi atingon por strategiaj celoj kaj antaŭenigi la prestiĝon de la Esperanto-movado en la okuloj de Unesko kaj aliaj kulturaj instancoj?

Sinjorinoj kaj sinjoroj, ĉiu el vi havas proprajn prioritatojn. Vi devus plenvoĉe emfazi tion, kio aspektas al vi plej grava, kaj agordi viajn planojn laŭ tiuj preferoj. Mi mem hodiaŭ volas tiri vian atenton al la ŝlosila graveco de la kulturo kaj la arto. En movado, kiun lastatempe plej zorgigis la ekonomiaj demandoj – sendube ne malprave – ni devas fari iom da fortostreĉo por kapti la fakton, ke la arto ne estas fakultativa beligilo de baze instrumenta tagordo.

Por resumi mian penson, mi elpensis malpezan sed tamen ne malseriozan sloganon: La rakontoj estas ne malpli realaj, ol la kontoj. Por ne perdi la ekvilibron, kaj por montri do estimon al la kontistoj, mi ankaŭ emfazas krompenson pri la tradukado: tiu, kiu tradukas, devas aldoni plusvaloron. La diskuton pri tia plusvaloro mi ŝatus bazi sur esperantistaĵo analoga al la iama


lingvopatriotisma aforismo de la franclingvanoj.

France oni diradis *Ce qui n'est pas clair n'est pas français*, “Tio, kio ne estas klara, ne estas franca”. Eble la plusvaloro, kiun alportu al la esperantiga entrepreno niaj tradukantoj, premisu kiel ekirpunkton similan aforismon el nia medio: “Tio, kio ne estas gastama, ne estas Esperanta”, kiu havas pli da pezo ol nuraj sloganoj, ĉu ne?

Dirante, ke tiu aforismo spegulas la esperantistan medion, mi invitas kritikojn. La recenzema publiko sendube regalos min per kritikoj. Kial do mi elektis la vorton ‘gastama’? Ĉu min interesas ĉefe la vidpunkto de la pli bonstataj landoj, kapablaj prezenti sian gastigeman vizaĝon? Ĉu mi celas marĝenigi aŭ embarasi la vizitantojn el landoj malprosperaj, kiuj pli ofte gastas? Tio estas ekzemplo de kritikoj, kiuj okupiĝas pri la simetriemo inter la landaroj.

Kritiko de alia speco aŭ alia ĝenro aperos ĉe tiuj inter vi, kiuj preferas pensi al la siaspeca spico de nia karmemora Raymond Schwartz. Tiaj kritikantoj demandas, kial mi do ne elektis pli bonvivecan esprimon kiel ...bongasta. Antaŭ ol la homoj komencos misciti Kalocsay kaj deklami, ke ili kutimas “konstrui neston sed kongrese nesti”, mi haste fermas la temon, sinjorinoj kaj sinjoroj!

La kritikantoj senmanke pravas. Tute arbitre mi aforismis, ke ‘Tio, kio ne estas gastama, ne estas Esperanta’. Bonvolu permesi, ke por kompensi tiun arbitran elekton de la vidpunkto de la gastiganto mi citu teksteron, kiu klasike prezentas la gastan vidpunkton. George Steiner skribis: “Nenio estas pli beste absurda ol la preteco de homoj brulmurdi aŭ masakri unu la alian en la nomo de naciismo aŭ sub la infanca sorĉo de iu flago”. La civitaneco estas duflanka interkonsento, kiu estas, kiu ĉiam devus esti, submetebla al la kritika repripensado kaj al laŭbezona retiro. Neniu homa civito meritas, ke oni ĝin konservu per gravega maljusto, per seriozega malvero. La morto de Sokrato superpezas la konserviĝon de Ateno. Sendube nenio donas al la historio de Francujo pli da digno ol la preteco de la francoj ĝisiri ĝis la rando de la disfalo de la komunumo, la preteco draste malfortigi la solidarecon de la naciismo, pro la skandalo Dreyfus... [Kaj nun bonvolu aŭskulti mian kursivigon de la ĉi-sekva frazo:] “*Arboj havas radikojn; homoj havas kruojn, per kiuj foriri post konscienca decido diri: Ne.*” (Steiner 1984: 195-6). [*The cleric of treason*, A Steiner Reader. Harmondsworth: Penguin.]



Ne pensu, ke irante de la vortludema Schwartz al tiu ĉi serioza tekstero de Steiner, mi ŝanĝas la temon aŭ la agordon de miaj komentoj. Tiu sama Schwartz ankaŭ aŭtoris la tute seriozan romanon *Kiel akvo de l' rivero* pri la horora absurdeco de la militado kaj de tiuj naciaj standardoj, per kiuj oni pravigas ĝin. Kaj tiu sama Steiner aliloke montras sin amanto de vortludoj. Tiuj grandaj aŭtoroj, kiuj serioze kritikas la militon, ankaŭ scipovas bone vivi dum la pacaj horoj. Ili scipovas la arton bone amuzi sin mem kaj la aliajn en tiu gasta spaco, kiun gajigas ĉies bonhumoro. Ne temas pri fakultativa kromfakto: la kunesta gajemo konsistigas la gastamon.

SinJORinoj kaj sinJORoj, la gastamo mem estas la fundamenta arto de nia komunumo. Tiun arton modele praktikas miloj da sennomaj gastamantoj tra la tuta geografio kaj historio de Esperantujo. Ili ne verkas predikojn aŭ romanojn aŭ kongresajn paroladojn, sed ili konsistigas Esperantujon. Se vi permesos al mi unu vortludon, temas pri ...gastonomia arto; praktikas ĝin ne nur la regalemaj gastigantoj sed ankaŭ la ĝissate manĝantaj gastoj. Ĉi ties bongasta evidentigo de sia ŝato de bongusta kuirajo inde sekvas la gastigan movimenton; nur tiel kompletigas la simfonio de la gastamo.

Ni ofte kaj prave emfazas diversajn sciencajn argumentojn, per kiuj ni pledas por racia traktado de la lingva sfero. Tamen, por ke renkontiĝu "homoj kun homoj" kaj kreiĝu la volo aranĝi raciajn solvojn, devas forte aŭdiĝi la voĉo de la koro. Tiun voĉon fortigas antaŭ ĉio la gastama arto. Ekzistas neniu momento, en kiu ni povus provizore ĉesigi la gastamadon; tia ĉeso signifus, ke la komunumo ĉesus spiri.

Ĉi tiuj paroloj pri la arto aspektos malekvilibraj, se mi kontentigos min per unusola ekzemplo, vjetnama, de la homa kulturo. Por ke ni estu kopenhage ekvilibraj, permesu al mi tiuj

reliefigi ekzemplojn nordajn. Ĉi tiuj ekzemploj ankaŭ montros, ke mi ne prezentas al vi bizare personan interpreton de la aktuala stato de nia interna ideo.

Katalin Kováts faris pri Vincent Van Gogh brilbrilan prezenton en 2008; la ĉeestantoj ĝin recenzis kiel la plej vervan prelegon, kiun ili iam aŭdis. Humphrey Tonkin, komence fakulinte pri la renesanca angla literaturo, dum kelkaj jardekoj energie okupiĝis pri sciencaj esplorado kaj esplorigo; sed dum sia tuta laborvivo li senhalte produktis kaj produktas gemojn de la elŝekspira tradukarto. La ekzemploj de Tonkin kaj Kováts montras la konscion ĉe niaj pintaj agantoj, ke la konstanta okupiĝado pri la arto estas por Esperantujo same esenca kiel la spirado.

Mi komencu resumi, sinJORinoj kaj sinJORoj. Ne sufiĉas senĉese paroli pri nia rakonto: ni devos verve vivi ĝin en nia ĉiutaga gastamo inter esperantistoj, kiu brakumas ankaŭ aliajn, ĉar ĉiuj homoj estas potencialaj esperantanoj. Tiel ni ekzemplas la arton de la gastamo en ĉiu nia spiro. Se krome iuj el ni restos en tonkine aŭ kovatse konstanta kontakto kun la senmortaj majstroj de la homa arto, tio des pli riĉe spronos la kreaĵon impulson ĉe ĉiuj anoj de nia bunta komunumo. La efikoj de tia riĉiĝo videblos en la plusvaloro, kiun niaj tradukantoj manifestados en siaj esperantigoj.

Ne restos tiam nur belvortaĵo tiu aforismo, ke tio, kio ne estas gastama, ne estas Esperanta. Estos tute klare videble, ke kiam ajn teksto tradukiĝas el etna lingvo en Esperanton, ĝi envenas en tiun unikan konversacion inter konversacioj, kiu ikone praktikas la komune-homan arton de reciproka gastado. Tiel ni daŭrigos nian laboron renversi la malekvilibron en la traduka trafiko, kaj nian agadon sur aliaj terenoj de tiu interŝanĝado de kultureroj, kiu plej daŭropovige nutras la tagordon de la monda paco.

Dankon pro via atento.

Probal Dasgupta

Internacia Scienca Asocio Esperantista sin renovigas

Post la grandega kaj fruktodona laboro de Prof. Sachs, en la Universala Kongreso en Kopenhago estis elektita nova estraro.

José Antonio Vergara (dekstre sur la foto) iĝis la nova prezidanto, kaj kunordigos la laboron de Claude Labetaa, Mélanie Maradan, Francesco Maurelli kaj Johannes Mueller.

La kunveno en Kopenhago vekis multe da interesiĝo kaj pliaj dek homoj sin anoncis por kunlabori kun ISAE. La rezulto estis gaja, fruktodona kunveno, kiu reprezentas la bazon de la nova laboro de ISAE.

Jam en KAEST 2010 neformala renkontiĝo de ISAE-aktivuloj montris la vojon al renovigo de la asocio, kun granda debato kaj aktiva partopreno de la ĉeestantoj.

Tio estas plia indikilo ke ISAE estas tute malferma asocio, ne nur por sciencistoj, sed ankaŭ por scienc-amikoj pli ĝenerale. Tio ja estos grava punkto en nia estonta agado: klopodi aktivigi kiom eble plej multe da homoj, kiuj ŝatas sciencan en ajna formo.

La ĉefa agadkampo de ISAE estas pledo por demokrata komunikado en sciencaj rilatoj, kune kun la apogo al originala scienca produktado en Esperanto.

Se vi volas kunlabori, vi estas tre bonvena. Ni starigis retan diskutliston: *isae-dl*. Por aliĝi, vi povas sendi mesaĝon al isae-dl+subscribe@googlegroups.com aŭ kontakti unu el la estraranoj. La kontribuo de ĉiuj estas tre grava. Kune ni vere havas la eblecon kontribui signife al pli demokrata scienco!

Francesco Maurelli

francesco.maurelli@esperanto.it



UEA honorigis, premiis kaj diplomis

En la 96-a UK estis solene anoncitaj novaj Honoraj Membroj kaj ricevantoj de movadaj diplomoj kaj premioj pro meritplenaj aktivaĵoj, kaj subvencio por ebligi estontan agadon.

Tri novaj Honoraj Membroj:

Detlev Blanke

Germano, nask. 1941. Sekretario de Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR 1968-1980 kaj ekde 1981 de Esperanto-Asocio de GDR. Li doktoriĝis en 1976 per disertacio pri kompara vortfarado de Esperanto kaj la germana, kaj habilitiĝis¹ en 1985 per disertacio pri planlingvoj (*Internationale Plansprachen*). En 1988 li fariĝis docento pri interlingvistiko en la Berlina Humboldt-Universitato. Ekde 1976 li estas estrarano de Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED), kies bultenon *Informilo por Interlingvistoj* li redaktas ekde 1992. Ekde 1992 li kompilas (kun H. Tonkin) bibliografion pri Esperanto kaj interlingvistiko por la usona Modern Language Association. Li iniciatis la Esperantologiajn Konferencojn, kiuj okazas ekde 1978 en ĉiu UK. Kun sia edzino Wera li laboras i.a. pri terminologio kaj iniciatis la fondon de Terminologia Esperanto-Centro de UEA en 1987.




Renato Corsetti

Italo, nask. 1941. Laboris dum la unua parto de la vivo en banko kaj poste en la Universitato de Romo. Aktiva en la Esperanto-movado de la fino de la 1960-aj jaroj. Prezidanto de TEJO 1971-1973, poste honora prezidanto. Estrarano de UEA 1980-1986, vicprezidanto 1998-2001 kaj prezidanto 2001-2007. Membris en multaj komisionoj de UEA kaj estis prezidanto 1980-1986 kaj vicprezidanto ekde 2002 de Institucio Hodler '68. Estrarano kaj prezidanto de Itala Esperanto-Federacio dum pluraj periodoj. Membro kaj sekretario de la Akademio de Esperanto ekde 1999. En 2008 ricevis la Premion Deguĉi. Aŭtoris aŭ redaktis multajn librojn kaj artikolojn. En sia agado li aparte interesiĝas pri la disvastigo de Esperanto al ĉiuj kontinentoj kaj pri ĝia utiligo por certigi la lingvajn homajn rajtojn je ĉiu nivelo.



Rob Moerbeek

Nederlandano, nask. 1936. Ekde 1969 laboris 32 jarojn kiel oficisto de UEA, zorgante pri la ekspedofako de la Centra Oficejo kaj pri provlegado de *Esperanto* k.a. periodaĵoj kaj eldonaĵoj de UEA. Li prizorgis ankaŭ la Bibliotekon Hodler kaj la arkivon de la CO. Post emeritiĝo en 2001 li laboras volontule en la CO.



Li korektas ankaŭ la revuojn *Monato*, *Internacia Pedagogia Revuo*, *Scienca Revuo*, *Fen-x* (E-o Nederland), *Esperantista Vegetarano*, *La Kontakto* (nederlanda LIBE-sekcio) k.a. Agado por handikapuloj, precipe blinduloj, estas proksima al li. Li prizorgas voĉlegadon de *Esperanto* k.a. revuoj por blinduloj. Ekde 2001 li reprezentas Ligon Internacian de Blindaj Esperantistoj en la Komitato de UEA. Li estis privatdocento pri E-o ĉe la Universitato de Amsterdamo 1978-1998. En 2000 li ricevis la Premion Deguĉi.

Premio Onisaburo Deguĉi al Hori Jasuo

La Estraro de UEA aljuĝas la Premion Onisaburo Deguĉi por agado, kiu per Esperanto antaŭenigis internacian amikecon kaj solidarecon en la spirito de D-ro L.L. Zamenhof kaj Onisaburo Deguĉi. La Premio estis starigita en la Jubilea Jaro de Esperanto, 1987, per donaco de Oomoto kaj konsistas el diplomo, monsumo de 2 000 eŭroj kaj donaceto de Oomoto.



Ĉi-jare la Premion Deguĉi ricevas Hori Jasuo el Japanio pro multjara agado por konigi la japanan kulturon tra la mondo per prelegvojaĝoj, artikoloj kaj libroj, inter kiuj elstaras lia almanako *Raportoj el Japanio*, aperinta jam en 14 volumoj ekde 1997. Krome, ĉi-jare oni povis preskaŭ ĉiutage legi en Esperanto liajn retajn raportojn pri la vivo post la tertremo, cunamo kaj atomcentralla katastrofo okazintaj en marto en lia lando.

Subvencio Cigno en 2011

Subvencio Cigno estis starigita per donaco de la japana esperantista mecenato Etsuo Miyoshi por subteni Esperanto-projektojn en la Tria Mondo kaj la iamaj socialismaj landoj de Eŭropo. Ĝi valoras 500 000 enojn, t.e. ĉirkaŭ 4 500 eŭrojn.

Ĉi-jare la Estraro de UEA dividis la subvencion inter tri ricevantoj:

Fondaĵo Ameriko por vojaĝkostoj lige kun la 8-a Tutamerika Kongreso de Esperanto (TAKE) en San-Paŭlo, Brazilo, kaj por eldono de lernomaterialoj por hispanlingvanoj;

Esperanta filmfestivalo lige kun la 8-a TAKE; kaj

Dokumenta Esperanto-Centro en Zagrebo, Kroatio, por plibonigi siajn materiajn kondiĉojn kaj pligrandigi siajn kolektojn.

Diplomo de UEA al 12 elstaraj Esperanto-agantoj

En la inaŭguro de la 96-a UK oni anoncis la nomojn de tri novaj Honoraj Membroj de UEA. Alia formo de honorigo en UEA estas la Diplomoj pri Elstara Agado kaj Elstara Arta

Agado. Ĉi-jare la Estraro decidis distingi per diplomo 12 Esperanto-aktivulojn.

Diplomo pri Elstara Agado: **Jorma Ahomäki** el Finnlando pro elstara loka agado kaj gazetara informado pri Esperanto; **Augusto Casquero** el Hispanio pro instruado de Esperanto en Ĉinio kaj Vjetnamio; **Helmar Frank** el Germanio pro elstara antaŭenigo de Esperanto kiel lingvo de scienco, precipe pere de la Akademio Internacia de Sciencoj; **François Xavier Gilbert** el Francio pro longtempa gvidado de la Koresponda Servo Mondskala de UEA; **Heidi Goes** el Belgio pro sukcesa agado por disvastigo de Esperanto en

Indonezio; **Mireille Grosjean** el Svislando pro laboro por Esperanto en Afriko kaj utiligo de Esperanto por interkultura edukado; **Andrzej Grzębowski** el Pollando pro antaŭenigo de turismo per Esperanto kaj pro agado sur la kleriga kampo; **Géza Kurucz** el Hungario pro modela redaktado de la revuo *Juna Amiko*.

Diplomo pri Elstara Arta Agado: **Kim Henriksen** el Danio kaj **Jean-Marc Leclerc (jOmO)** el Francio pro longtempa kontribuo al la Esperanto-muziko; **Carmel Mallia** el Malto kaj **Abel Montagut** el Katalunio pro elstara kontribuo al la Esperanta poezio.

Tutmonda, facila kaj regula

La salono ne sukcesis enteni la homojn, kiuj volis aŭskulti la programeron de la kleriga lundo pri “Esperanto: ĉu Fundamenta, postFundamenta aŭ preterFundamenta”, kaj sama kvanto (pli ol 100) ĉeestis la kunvenon de la nova (Ne)faka (Ne)asocio Tutmondeca Esperanto.

Ankaŭ la temoj samis. Unuflanke staras la kavaliroj de la tiel nomata “bona lingvo”, laŭ tre legita libro de Claude Piron, kaj aliflanke la defendantoj de la evoluanta Esperanto kun ĝiaj malregulaĵoj kaj eŭropaĵoj (vi jam povas kompreni en kiu flanko estas la artikolanto).

Tamen la pozicioj ne estas tiel ekstreme malproksimaj, ĉar ekzistas tuta gamo de Esperanto-j, de la rigide Fundamenta al la lingvaĵo de Karolo Piĉ, en kiu la abundo de novaj radikoj sufokas la pensojn.

Bonŝance ekzistas ora mezo kaj al ĝi apartenas la prezidinto de la kunveno en la kleriga lundo, Otto Prytz, akademiano, kiu restas ĉe la Fundamentaj principoj de la lingvo kaj ŝpareme kaj singarde akceptas novaĵojn, dum mi mem kaj Gerrit Berveling defendis la poziciojn fundamentisman kaj evoluigisman.

La parolemo de la publiko, kiu volis informi pri siaj ideoj pli ol demandi la prelegintojn, estis apenaŭ bremsebla.

La ĉeestantoj, almenaŭ parto de ili, plenskribis demandaron, el kiu evidentiĝas, ke ĉiuj volas unuecan lingvon, sed malmultaj efektive konas kaj uzas la Fundamenton. Ankaŭ la pli specifa demandaro, pri tio, kiu el du frazoj estas efektive en la Fundamento, donis rezultojn alarmajn. Pli-malpli duono de la respondintoj (kiuj deklaras, ke ili parolas Esperanton de jardekoj) havas dubojn pri tio, ĉu en la Fundamento oni diras “Resti kun leono estas danĝere” aŭ “Resti kun leono estas danĝera” por ne paroli pri tio, ĉu la serio “Sana, sano, sanulo, malsanulo, malsanulejo” aŭ la serio “Sana, sano, sanulo, malsanulo, hospitalo” estas la serio de la Fundamento.

La Akademio, ILEI, lernu.net, edukado.net ktp. havas ankoraŭ multan laboron farindan.

En la kunveno de Tutmondeca Esperanto, aliflanke, oni parolis iom pli detale pri manieroj apliki la 15-an regulon en la nuna tempo. Estas klare, ke nun oni ne plu povas konsideri

nur la eŭropajn lingvojn kiel fontolingvojn de Esperanto por novaj radikoj. La tutmondiĝo kaj la reto postulas, ke antaŭ ol enkonduki novan radikon oni almenaŭ informiĝu, kiel oni diras tion en la ĉina, en la indonezia, en la japana, en la araba ktp. Pri tio prelegis Johan Derks, kiu provas antaŭenigi la ideojn esprimitajn dum la lastaj jaroj de Andreas Kueck. Pri la formado de novaj vortoj por novaj konceptoj en neeŭropa lingvo parolis Cvi Solt el Israelo rilate al la nova hebrea.

Ankaŭ en tiu kunveno la demandemo estis granda. Kelkaj aliĝis surloke al la nova asocio, kaj la aliaj, kiuj volus partopreni la laborojn por tutmonda, regula kaj facila Esperanto, povas fari tion per mesaĝo al la.bona.lingvo@gmail.com.

Renato Corsetti

**VIZITU VIAN PROPAN DOMON ĈE
NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM**

MALFERMA TAGO

sabaton la 26-an de novembro 2011 (10h00 - 17h00)



- ☆ En la libroservo ĉio rabatita je 10%
- ☆ Specialaj ofertoj
- ☆ Bazaro de e-ĵoj
- ☆ Senpaga loterio
- ☆ Kafo kaj teo senpage servataj

Speciala gasto:
SPOMENKA ŠTIMEC
pri Tibor Sekelj



Internacia Infana Kongreseto: Infane vikingis 1 dano kaj 38 eksterlan-danoj



Foto: Jesper Jacobsen

Ĉu vi jam imagis lerni pri vikingoj, amuziĝante en Danio en internacia etoso? Tion faris 32 infanoj kaj 7 gvidantoj el 15 landoj dum la 42-a Internacia Infana Kongreseto, kiu okazis de la 23-a ĝis la 30-a de julio 2011 en Hundested, norde de Kopenhago.

Post enkonduko kun la gepatroj en la UK-ejo Bella Center, la infanoj ekis por urboludo tra Kopenhago. Buso atendis ilin ĉe la Marvirineto por veturi al la infancentro Gallebjerggard. Tie nia gastigantino Lene bonvenigis nin kun agrabla familia etoso.

Dum unu semajno la infanoj konstruis vikingan drakaron kun Lisa, lernis Kajto-kantojn kun Jesper, sportumis kun Matthias. Krome ili partoprenis programojn faritajn de junuloj mem, ĉu origamion kun Samy, ĉu gimnastikon kun Mimi. Ili eĉ preparis kun Tina belegajn halt-movajn filmetojn (angle “stop-motion”) per la origamiaĵoj.

Ĉiumatene ili praktikis Esperanton en amuza etoso, la komencantoj kun Jesper, la progresantoj kun Bert kaj la fluparolantoj kun Adenjo.

Tiuj lastaj (la pli aĝaj fakte) spertis debatadon, diversajn amuzajn ludojn kiel Amnesia aŭ Kvarono de simio. Ili ludis “bakalaŭron”, ludon kiu konsistas el tio trovi vortojn Esperante por unu komenca litero.

Plurfoje la infanoj havis la okazon praktiki sian Esperanton, ĉu skribe, ĉu parolante, prezentante al la aliaj siajn ŝatokupojn. Gravas ke la infanoj havu la okazon plibonigi sian Esperanton, tiom pli bone se ludante.

Iun vesperon, post malapero de la kapitano de la ŝipo, ili devis enketi por scii, kio okazis. La solvo de tiu enigmo okupis tutan vesperan programon, per la rakontoj de la kaptita reĝino, kuiristino, remisto aŭ ĉefo de la remistoj, kiuj “transportis” ilin en la ŝipa etoso.

Kelkaj infanoj memoras la tipan nigran panon kiun ili manĝis en siaj ĉiutagmezaj sandviĉoj, aŭ la belajn ondojn de la malvarma maro Kattegat.

Verŝajne la plejmulto memoros pri la neforgeseblaj eksteraj glitŝnuro, balanciloj kaj la abunda programo, ĉu lingva, sporta aŭ pli trankvila.

Nepre memorindas ankaŭ la intergeneracieco de la aranĝo (vizito al ekologiaj domoj kun la junulara programo de la UK, posttagmezo kaj internacia vespero kun gepatroj) kaj la multnombraj novaj aktivajoj.

Se vi (infano prefere malpli-ol-14-jara aŭ ebla gvidanto) ne havis la ŝancon partopreni tiun IIK-on, vi eble havos la okazon partopreni la venontan en Hanojo (Vietnamio), fine de julio 2012.

Ĝis revido iam en IIK!

Adenjo Charrière

De la 41-a UK al la 42-a IIK:

Jubileo de la Internacia Infana Kongreseto

En la Kopenhaga UK okazis nekutima kunsido: jubileo de la Internacia Infana Kongreseto (tiel nomata IIK), kun la titolo „De la 41-a UK al la 42-a IIK“. Efektive, la unua IIK okazis en Kopenhago en 1956, paralele al la 41-a UK. Plurajn jarojn poste, la 41-a IIK denove okazis en Danio. Dum unu horo kaj duono pluraj IIK-gvidantoj kaj -partoprenintoj rakontis pri siaj (amuzaj) spertoj. Poste novaj aktivuloj prezentis siajn ideojn.

La kunsido estis gvidata de Adenjo Charrière, kun la helpo de Heleno Fantom kaj Kristoforo Fettes. Ili ambaŭ helpis en la organizo de tiu evento. Kristoforo respondicis (kun helpo de Heleno) dum proksimume 10 jaroj pri IIKoj.

Materialo konsistis el bildprezento kaj diversaj rememorigaj elementoj pri pasintaj IIKoj. Unue ni aŭdis (dank' al Benata) legadon de teksto pri sentoj rilate al la unua IIK. Iom poste Ian Fantom laŭtlegis tekston de Gian Carlo Figheira, honora membro de UEA. Kristoforo Fettes afiŝis pli ol cent fotojn el multaj infanaj kongresetoj. Peter Weide kunportis sian kongreslibron, tiun de la 1a IIK. Benata ankaŭ kunportis diversajn materialojn (kiel leteroj de aliaj infanoj).

La riĉa programo allogis inter 70 kaj 80 personojn, el kiuj multaj (iom pli ol la duono) iamaj partoprenantoj de pasintaj IIKj. Ili tre aprezis la diversecon de stiloj, balancitan inter prezento, amuza anekdoto, priskribo de fotoj faritaj antaŭ pli ol 40 jaroj. Pluraj ĉeestantoj regalis nin per diversaj anekdotoj.

La kunsido ne nur rakontis pri pasintaj okazaĵoj, sed ankaŭ pri la estonteco de la infanoj kaj de la kongresetoj.



Adenjo Charrière kaj Heleno Fantom

Mi prezentis la aktualan IIK-teamon, pluraj el la gvidantoj partoprenis siatempe infanajn kongresetojn.

Ĉe la fino de la kunsido Manuela Ronco (tiama volontulino de TEJO) venis prezenti sian ideon pri adoleskaj aranĝoj.

La Infanaj Kongresetoj certe bezonas vian apogon, ĉu per financa rimedo, ĉu per ludoj, ĉu per homaj fortoj (novaj gvidantoj ĉiam bonvenas).

Tiu eksterordinara jubileo estis samtempe okazo rakonti pri pasintaj renkontoj de infanoj, revidi konatajn vizaĝojn de la movado, kaj ankaŭ belega ebleco de kunlaboro inter generacioj kaj interŝanĝo de spertoj.

Mi ŝatus danki ĉiujn partoprenantojn de la kunsido, precipe tiujn kiuj rakontis anekdotojn. Mi ŝatus aldoni specialan dankon al Heleno Fantom, kiu multe helpis per siaj plurjaraj spertoj, apogante la organizon de tiu ĉi evento kaj sugestante farenadojn por la Infanaj Kongresetoj.

Adenjo Charrière



Fotoj: Benata Hengstmengel-Koopmans



Kolektado de infanoj antaŭ forveturo al IIK 2011

Unuiĝintaj Nacioj: Interŝtata organizaĵo

Mallonga enkonduko en la strukturon de la UN-familio de organizaĵoj

Fonda Dokumento

La Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj starigis UN kaj ties manieron de funkciado. Ĝi estis formulita kaj subskribita de reprezentantoj de 50 fondaj ŝtatoj la 24-an de oktobro 1945.

Strukturo

La fondintoj starigis sespartan strukturon, kiu tra la jaroj multe plikomplikigis:

- Kuratoreca Konsilio
- Sekureca Konsilio
- Ĝenerala Asembleo
- Ekonomia kaj Socia Konsilio (EKOSOK)
- Internacia Kortumo
- Sekretariato



La Asembleo kunvenas kutime ĉiujare inter septembro kaj decembro.

Ekonomia kaj Socia Konsilio (EKOSOK)

EKOSOK havas 54 membrojn elektitajn de la Ĝenerala Asembleo kun du trijaraj mandatoj. EKOSOK respondecas pri kunordigo kaj superrigardo de la ekonomia kaj socia agado de Unuiĝintaj Nacioj. Inter la taskoj de EKOSOK estas superrigardi neregistarajn organizaĵojn en rilato kun UN, kiel ekzemple Universala Esperanto-Asocio, kaj pritaksi ilian kontribuon al UN.

Faktoroj influantaj la strukturon

La hodiaŭa komplika strukturo de UN estas produkto de pluraj faktoroj, ekzemple:

- La historio (funkcioj kaj organoj hereditaj de la Ligo de Nacioj, la granda interregistara organizaĵo de la intermilitaj jaroj).
- La fondaj dokumentoj.
- Dumtempaj bezonoj (ekzemple, en la fruaj jaroj de UN oni establis plurajn organojn por pace atingi malkoloniadon; post la tragika milito en Jugoslavio oni starigis specialan kortumon por trakti militajn krimojn).
- Novaj cirkonstancoj (oni fondis novajn organojn por prizorgi temojn, kiuj aperis sur la tagordo de UN, ekzemple la krizon de aidoso, aŭ la kreskantan interesiĝon pri la statuso de virinoj).
- Kunordigo (tiel komplikaj strukturoj produktas foje intermikson de taskoj aŭ neglekton de esenca laboro; rezulte oni emas fondi ankoraŭ novajn strukturojn por kunordigi la malnovajn).
- Politika kaj administra malfacileco malfondi ekzistantajn strukturojn aŭ raciigi ilin.

La Kuratoreca Konsilio

Oni establis la Kuratorecan Konsilion por garantii la efikan administradon de ne-memregaj teritorioj. Oni suspendis la Konsilion kiam la lasta tia teritorio (Palao) sendependiĝis en 1994.

Sekureca Konsilio

Tiu organo estas respondecas pri konservado de paco kaj sekureco. La Konsilio havas kvin konstantajn membrojn (Britio, Ĉinio, Francio, Rusio kaj Usono) kaj dek cirkulantajn membrojn elektitajn ĉiun duan jaron de la Ĝenerala Asembleo, por (laŭstatute) konservi geografian ekvilibron.

Ĝenerala Asembleo

La Ĝenerala Asembleo estas la baza konsulta (politika) organo de UN. Ĉiu membro (ĝi havas 193 membrojn) havas unu voĉon, sendepende de sia grandeco resp. malgrandeco. Certaj decidoj estas decidataj per simpla plimulto, aliaj per du trionoj de la voĉoj.

Internacia Kortumo

La Internacia Kortumo (Monda Kortumo) havas la taskon solvi disputojn inter membroj de UN kaj doni jurajn konsilojn al la diversaj organoj de UN. La Kortumo ne traktas aliajn specojn de disputoj (ekzemple rilate al individuoj aŭ aliaj privataj partioj). [En 1998 UN establis apartan Internacian Kriman Kortumon kun jurisdikcio super personoj akuzataj pri militaj krimoj, krimoj kontraŭ la homa digno aŭ genocido.]

Sekretariato

La Sekretariato estas la administra organo de UN, respondecas pri la funkciado de la ĉiutaga laboro. La Sekretariaton gvidas la Ĝenerala Sekretario de UN. Por la Sekretariato laboras 40 000 oficistoj: 12 000 en la sidejoj, 2 500 en regionaj komisionoj, 1 500 en diversaj aliaj lokoj, 2 000 en tribunaloj, 22 000 en packonservado (statistiko de la jaro 2009).

Organoj de la Sekureca Konsilio

La Sekureca Konsilio superrigardas la packonservajn operaciojn de UN. Krome la Packonstrua Komisiono helpas kunordigi tiujn operaciojn kun la Ĝenerala Asembleo kaj kun EKOSOK – kaj kun la Oficejo de la Ĝenerala Sekretario. La Konsilio havas i.a. Kontraŭterorisman Komitaton kaj ĝi ankaŭ prizorgas Krimajn Tribunalojn por la eksa Jugoslavio kaj por Ruando.

Organoj de la Ĝenerala Asembleo: Komitatoj

La Asembleo havas ses bazajn konstantajn komitatojn:

- Malarmado kaj Internacia Sekureco (Unua Komitato)
- Ekonomio kaj Financo (Dua Komitato)
- Socia, Homhelpa kaj Kultura Agado (Tria Komitato)
- Malkoloniado (Kvara Komitato)
- Administra kaj Buĝeta Agado (Kvina Komitato)
- Juraj Demandoj (Sesa Komitato)

La Asembleo havas plurajn aliajn konstantajn komitatojn, dumtempajn komitatojn, kaj suborganojn.

Krome, la Asembleo havas Konsilion pri Homaj Rajtoj, kiu laboras ĉe UN-Ĝenevo.

Organoj de la Ĝenerala Asembleo:

Programoj kaj Fondusoj

La programoj kaj fondusoj konsistas el dek organoj, kun diversaj suborganoj, interalie (laŭ la anglalingvaj mallongigoj) UNCTAD (komerco kaj evoluigo), UNEP (homa medio), UNICEF (infanoj), UNDP (evoluigo – kun diversaj suborganoj), UNHCR (rifuĝintoj).

Krome, la instituto pri trejnado kaj esploro, UNITAR, respondecas rekte al la Ĝenerala Asembleo, same kiel pluraj aliaj instancoj, ekzemple la Universitato de UN (UNU) kaj la programo kontraŭ aidoso, UNAIDS.

Organoj de EKOSOK: Komisionoj

Inter la diversaj organoj de EKOSOK estas Komisionoj pri

- Narkotaj Drogoj
- Krimoprevento kaj Krima Justico
- Scienco kaj Teknologio pri Evoluigo
- Daŭripova Evoluigo
- Statuso de Virinoj
- Populacio kaj Evoluigo
- Socia Evoluigo
- Statistiko

Aliaj Organoj de EKOSOK

Inter la aliaj organoj de EKOSOK estas ses Regionaj Komisionoj, kun sidejoj en diversaj partoj de la mondo, por Afriko, Eŭropo, Latinameriko kaj Karibio, Azio kaj Pacifiko, Okcidenta Azio.

EKOSOK havas plurajn aliajn forumojn kaj konstantajn komitatojn.

Kelkaj t.n. “rilataj organizaĵoj” proksime laboras kun la Ĝenerala Asembleo kaj EKOSOK sed estas esence sendependaj, precipe WTO (Monda Komerca Organizaĵo) kaj IAEA (Atomenergio).

Organoj de la Sekretariato

La Sekretariato havas 16 fakojn, kiuj liveras administran subtenon al la diversaj organoj de UN kaj plenumas bazan administradon. Inter ili estas Fakoj pri Mastrumado de la Ĝenerala Asembleo kaj Konferencoj (kio inkluzivas lingvajn servojn), kaj la Fakoj pri Publika Informado. (UEA havas formalan rilaton ne nur pere de EKOSOK sed ankaŭ kun la Fakoj

pri Publika Informado, kiu troviĝas en Novjorko). Apartaj fakoj superrigardas la operaciojn de la oficejoj de UN en Ĝenevo, Vieno kaj Najrobio.

Specialigitaj Instancoj

En la familio de UN-organizaĵoj troviĝas 15 specialigitaj instancoj, kiuj funkcias sendepende de, sed en kunlaboro kun, la organoj de UN. Ili havas siajn proprajn sistemojn de membraj ŝtatoj:

- ILO (Laboro)
- FAO (Nutrado kaj Agrikulturo)
- UNESCO (Edukado, Scienco kaj Kulturo)
- WHO (Sano)
- Monda Banko (sub kiu laboras kvin suborganoj)
- IMF (Mona Fonduso)
- ICAO (Civila Aviado)
- IMO (Maraj Aferoj)
- ITU (Telekomunikoj)
- UPU (Poŝto)
- WMO (Meteologio)
- WIPO (Intelektua Proprieto)
- IFAD (Agrikultura Evoluigo)
- UNIDO (Industria Evoluigo)
- UNWTO (Turismo)

La Jarmilaj Evoluigaj Celoj

Rezulte de Jarmila Pintokonferenco en la jaro 2000, la ŝtatoj devigis sin plenumi certajn celojn ĝis la jaro 2015. Tiuj celoj fariĝis ŝlosila elemento en la tuta planado kaj direktado de UN:

- Elradikigi ekstreman malriĉecon kaj malsaton
- Atingi universalan elementan edukadon
- Antaŭenigi seksan egalecon kaj doni povon al virinoj
- Redukti la nombron de infanaj mortoj
- Plibonigi patrinan sanon
- Kontraŭbatali HIV/aidoson, malarion kaj aliajn malsanojn
- Certigi daŭripovon de la homa medio
- Starigi tutmondan partnerecon por evoluado.

Lingvoj en UN

Nature, la subtenantoj de Esperanto interesiĝas pri la lingva reĝimo en Unuiĝintaj Nacioj.

- En la komenco de UN oni diferencigis inter laboraj lingvoj kaj oficialaj lingvoj.
- La Ligo de Nacioj uzis du lingvojn: la francan kaj la anglan. Oni disponigis ĉiujn dokumentojn en tiuj du lingvoj kaj oni uzis tiuj sekvan interpretadon en la formalaj sesioj de la Ligo.
- Kiam fondiĝis UN en 1945 oni deklaris tiujn samajn lingvojn laborlingvoj de la Ĝenerala Asembleo, kaj oni nomis tri lingvojn, nome la hispanan, la rusan kaj la ĉinan, oficialaj, kun certaj iom pli limigitaj rajtoj. Poste, en 1973, oni aldonis la araban.
- Dank’ al la invento kaj perfektigo de la aparatoj por simultana interpretado, iom post iom oni renomis la oficialajn lingvojn laboraj, tiel ke hodiaŭ la Ĝenerala Asembleo havas ses laborlingvojn: la anglan, la araban, la ĉinan, la francan, la hispanan kaj la rusan. Interpretado kaj tradukado estas liverataj por ĉiuj ses lingvoj, koste de la normala buĝeto de UN.
- De tempo al tempo oni pridiskutas la eblon aldoni pliajn



Katja kaj Trevor Steele vizitas la novjorkan oficejon

lingvojn, ekzemple la portugalan, la japanan, la germanan, la indonezian, la hindian-urduan, kaj aliajn, sed multaj ŝtatoj rezistas tiajn ŝanĝojn, timante politikan perturbon.

- Ankaŭ de tempo al tempo, sed tute neoficiale, oni proponas la uzon de Esperanto – ekzemple laŭ la (neoficiala) propono de la Ambasadoro de Aŭstralio Ralph Harry en la 1970aj jaroj. Tiaj proponoj ne trovis signifan oficialan reeĥon inter la membraj ŝtatoj.

- Kvankam la Ĝenerala Asembleo uzas ses lingvojn, la Sekretariato de UN restis ĉe la originalaj du – la angla kaj la franca.

- La aliaj instancoj kaj organoj de UN aŭ sekvas la ekzemplon de la Ĝenerala Asembleo aŭ havas propran lingvan politikon.

Prempunktoj por Esperanto

- La formala rilato kiun UEA ĝuas kun UN kaj Unesko datiĝas de 1954. UEA estas unu el multaj neregistaraj organizaĵoj, kiuj havas tiun statuson. Ĝi donas al tiuj organizaĵoj limigitajn rajtojn, kaj ĝi estas kondiĉita je la utileco de tiuj organizaĵoj al UN. Sekve, gravas, ke la esperantistoj disvastigu informojn pri UN inter la publiko, subtenu ĝiajn kampanjojn, instigu instruadon en la lernejoj pri la laboro de UN, kaj ĝenerale montru sian apogon.

- UEA povas uzi sian influon por levi la demandon de Esperanto pere de la Oficejo de EKOSOK por neregistaraj organizaĵoj (NROj), per la ĉiujara Konferenco de NROj, kaj per la Fako pri Publika Informado de UN. Ĝi ankaŭ havas certajn rajtojn interveni skribe kaj parole en la formalan laboron de UN.

- Utiligante tiujn vojojn, ĝi povas almenaŭ levi sian voĉon en organoj kun lingvaj kaj kulturaj dimensioj (ekzemple la Konsilio pri Homaj Rajtoj) kaj, laŭ sia povo, ĉe la oficejoj de la Sekretariato, kiuj okupiĝas pri lingvoj.

Kion ni povas fari?

- En Parizo (ĉe Unesko), Vieno, Ĝenevo kaj Novjorko laboras malgrandaj laborgrupoj por prizorgi la oficialajn rilatojn inter UEA kaj la koncernaj instancoj. Se vi loĝas en la proksimeco de unu el tiuj urboj, vi povas proponi vin kunlaboron.

- UEA havas malgrandan oficejon en 777 United Nations Plaza, domo trans la strato de la ĉefsidejo de UN en Novjorko, kie troviĝas la oficejoj de multaj NROj. La oficejo kaj la novjorka laborgrupo prizorgas interalie asocion por Esperanto-parolantoj kiuj interesiĝas pri UN, Esperanto por UN. Vi povas fariĝi membro de Esperanto por UN per simpla transdono de via retadreso ĉe info@esperanto-un.org. Vi ricevos de tempo al tempo informojn pri UN kaj ĝia agado.

- Landaj asocioj kaj unuopuloj povas aliĝi al la koncerna nacia Asocio por UN. Tiaj asocioj ekzistas en preskaŭ ĉiuj landoj.

- Landaj asocioj povas kontaktiĝi kun la landa Unesko-Komisiono kaj proponi sian kunlaboron.

- En multaj landoj ekzistas oficejoj de UN, ofte kun kunvenejoj utiligeblaj de la publiko. Landaj asocioj povas kontakti tiujn oficejojn kaj proponi reciproke informadon – kaj peti utiligi la kunvenejojn (kutime senpage) por certaj renkontiĝoj.

- Apenaŭ necesas diri, ke sentema kaj komprenema aliro al tiuj instancoj kaj organizaĵoj estas la plej bona vojo: se ni pozitive kaj solidare interesiĝos pri ili, ili simpatie rilatos kun ni.

Humphrey Tonkin

UN kaj Unesko

En la ILEI-konferenco la komisiito pri UN/Uneskaj aferoj pli konvene anstataŭis nova komisiono tripersona.

La konferencon kronis Simpozio pri Lingvoj de Scienca Komunikado kaj Edukado. En ĝi Mark Fettes traktis nian agadon por lingva diverseco kiel esence ekologian kontribuon. Tio montras nian engaĝon en la unua el dek UN-provokoj por la estonteco: ekologio, kiel la kerna solvo de tervarmiĝo kaj klimatsanĝiĝo. Jam antaŭ jaro ni pledis diskuti la dek problemojn en Esperanto-rondoj, helpe al la tutmonda bezono.

La UK donis plurajn kontribuojn: la kongrestemo mem, “Dialogo kaj Interkompreno”, rilatis la UN-jaron de la Junularo. La Movada Foiro unutable prezentis la unujaran ‘Esperanto por UN’, la Kleriga Lundo pli amplekse ol en la Havana UK prezentis la “UN-familion”, voĉe de Humphrey Tonkin, la novjorka volontulo Neil Blonstein kaj la estrarano Stefano Keller, aktiva en Ĝenevo.

La marda kunveno de ‘Esperanto por UN’ ne nur informis pri la atenta kaj sindediĉa agado en la UN- kaj Unesko-oficejoj en Novjorko, Ĝenevo kaj Parizo, sed ni ricevis liston da ebloj por mem partopreni en la agado de UN: se UN (re)-konu nin, ni konu ĝin kaj kunlaboru.

La “heptalogio” de Humphrey (kvazaŭ diordonoj) instigas nin

- Kontakti samlandan Unesko-komisionon (kie ĝi ekzistas)
- Kontakti Unesko-klubojn
- Kontakti la landan asocion de UN kaj kie eblas interveni pri lingvaj demandoj
- Kontakti lokajn oficejojn de UN (en 60 landoj) aŭ regionajn oficejojn de UN aŭ ĝiaj suborganizaĵoj
- Helpi al “Esperanto kaj UN” per retaj laboroj: traduki tekstojn, plibonigi la retpaĝojn
- Kontribui per mono (la nuna agado de ‘Eo por UN’ kostas po 5 000 USD jare)
- Kaj fine informi la mondon pri UN kaj nian ‘Eo por UN’ pri tiu informlaboro.

Retadreso: www.esperanto-un.org.

Rob Moerbeek



La kunveno “Esperanto por UN”.
Stefano Keller kaj Humphrey Tonkin.

Festotago honore al Claude Gacond

Claude Gacond estas svisa pedagogo kaj arkivisto. Li esperantistiĝis en 1952 kaj aktivas en Svislando. Li evoluigis propran rektan metodon, fondis la Centron de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) kaj Kulturen Centron Esperantistan en La Chaux-de-Fonds. De jardekoj li kutimas volontule donaci duonon de sia labortempo al Esperanto. Dum jardekoj li estis parolisto en la Esperanto-fako de Svisa Radio Internacia. Li estas honora membro de UEA, de ILEI kaj de Svisa Esperanto Societo (SES).

Okaze de lia 80-jariĝo SES organizis festotagon honore al li. Pli ol 100 personoj el 10 landoj ĉeestis la ceremonion, kiu okazis en la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds, kie CDELI funkcias. La ĉeestantoj povis sekvi tre interesajn kaj pozitivajn paroladojn de la prezidanto de la urba ekzekutiva konsilio Pierre-André Monnard kaj de la direktoro de la biblioteko Jacques-André Humair, kiu elstarigis la plurjardekan sindediĉan laboron de Claude Gacond por CDELI. Elstare interpretis al Esperanto Brian Moon kaj István Ertl.

Substrekante la ligon inter Barato kaj Svislando parolis Probal Dasgupta, prezidanto de UEA; konkludante li menciis la unikan personecon de Gacond kaj lian "ekumenan" prezentmanieron de dokumentoj pri diversaj planlingvoj.

Reinhard Haupenthal, la redaktinto, transdonis publike al Claude Gacond la festolibron, kiu entenas pli ol dudek kontribuojn de fakuloj.

Pluraj personoj dankis Andrée Gacond, la edzinon de Claude, pro ŝia tutviva subteno; ŝi ricevis grandan bukedon.



Claude Gacond la gaste, al dolo de la direktoro de la Biblioteko de la vila Jeanne-André Humair, ĉirkaŭ la prezidanto de la Asocio universala de esploro Probal Dasgupta (maldekstre).

Katalin Kováts, Ilona Koutny kaj Tomasz Chmielik kortuŝe prezentis la profundan signifon de sia kunlaboro kun Claude Gacond, kiu originas en la antaŭregimŝanĝa periodo. La staĝoj en KCE montris novajn horizontojn por orienteŭropanoj.

Ni povis aŭdi belegajn muzikpecojn danke al la Svisa Esperanto-Koruso kaj al aliaj muzikistoj. Fine de la festo okazis spontana koncerto.

La salono de CDELI zumis kiel abelujo pro la vigla interparolo de gastoj. Tagmeze okazis akcepto kun aperitivo kaj bongustaj manĝaĵoj

prezentitaj de la Urba Biblioteko.

Claude Gacond estis intervjuata de loka radio. Lunde la 29-an de aŭgusto en la gazeto *L'Impartial* aperis pozitiva artikolo kun foto, kun anonco sur la titolpaĝo.

La postfesta programo organizita de Claude Gacond en La Sagne estis tre agrabla kaj sukcesa (kun fonduo kaj koncerto de Georgo Handzlik).

Pluraj gastoj diris, ke de jaroj aŭ eĉ jardekoj ne okazis tia sukcesa solenaĵo en Svislando.

Por mendi la festolibron, kies titolo estas *Instrui, Dokumenti, Organizi*, oni rilatu kun la eldonejo Iltis per jena adreso: editioniltis@aol.com. **Mirejo Grosjean**



Navige tra TTT-paĝoj



WikiTrans

<http://epo.wikitrans.net/>

Maŝintraduko de la tuta angla Vikipedio en Esperanto.



Corpuseye

<http://corp.hum.sdu.dk/cqp.eo.html>

Esperanta tekstaro de Eckhard Bick kun 58 milionoj da vortoj.



Lingva Kritiko

<http://lingvakritiko.com/>

Studoj kaj notoj el esperantologio.

Marek Blahuš



La regionaj komisionoj de UEA per siaj fondaĵoj diskonigas kaj instruas Esperanton

En diversaj kontinentoj UEA havas regionajn komisionojn, kiuj okupiĝas pri la disvastigo kaj instruado de Esperanto en tiuj mondopartoj. Aktivaj komisionoj ekzistas por Afriko, Ameriko, Azio, Oceanio kaj la Meza Oriento kaj Norda Afriko. Konkretaj laboroj estis ke ili:

- Sendis instruistojn aŭ aranĝis kursojn (kunlabore kun ILEI) al i.a. Kenjo, Ugando, Burundo, Kongo, Laoso, Indonezio, Latinameriko, Alĝerio, Maroko kaj Samoo.
- Ĉiuj disponigas librojn, vortarojn kaj instrumaterialon al nepagipovaj kluboj kaj asocioj.
- Okazigis konferencojn kun ILEI en i.a. Benino kaj Havano.

Afriko:

- Partopreno en la Monda Socia Forumo en Senegalo (2010);
- Aktivulaj trejnadaj;
- Informado pri Esperanto;
- Kunligo de landaj asocioj kaj lokaj kluboj;
- Subvenciado de landaj asocioj por ebligi ilian agadon;
- Eldonado de la bulteno *Esperanto en Afriko*;
- Prizorgado de la retejo pri la Afrika Agado de UEA.

Azio:

- Okazigas Azian Kongreson ĉiun duan jaron (en 2010 en Ulanbatoro, Mongolujo);
- Starigis ttt-ejon por instrui Esperanton en aziaj landoj;
- Sendas instruistojn de Esperanto al aziaj landoj kun malforta movado;
- Subvencias eldonadon de lernolibroj kaj vortaroj en aziaj lingvoj;
- Membrigas aziajn aktivulojn al UEA kaj junajn esperantistojn al ILEI;
- Eldonas la bultenon *Esperanto en Azio*.

Ameriko:

- Okazigas Tutamerikajn Kongresojn (en 2011 en San-Paŭlo, Brazilo);
- Helpas eldoni varbfolion por la tuta Ameriko, i.a. en Meksiko kaj Kubo;

- Helpas pri kreo de retpaĝoj (i.a. en Meksiko kaj Venezuelo);
- Okazigas trejnseminaron por aktivuloj.

Meza Oriento kaj Norda Afriko:

- Okazigis kunvenojn en Jordanio kaj Turkio;
- Anoncas pri Esperanto en arabaj ĵurnaloj kaj verkas informilojn en lokaj lingvoj;
- Aperigis kaj dissendas la 10-lecionan Esperanto-kurson en la araba, prizorgis retan kurson en la araba;
- Aperigis la libron *La trezoro*, kolekton de proverboj kaj anekdotoj el la araba kaj islama kulturo.

Oceanio:

- Organizas kongresojn komunajn inter Nov-Zelando kaj Aŭstralio, kien ĝi invitas esperantistojn el landoj de la regiono;
- Starigis retejon por kunligi la esperantistojn kaj proponi retajn kursojn al ne-esperantistoj;
- Eldonas kaj subvencias librojn de indoneziaj esperantistoj.

Eŭropo:

Eŭropa Komisiono ankoraŭ ne ekzistas, bedaŭrinde.



Multaj kapablaj kaj sindonaj esperantistoj en tiuj mondopartoj okupiĝas pri la supre menciitaj laboroj. Finance tio eblas pro tio, ke ekzistas diversaj fondaĵoj tiucele. Iuj el ili eĉ havas propran kapitalon, el kiu ili ĉiujare ricevas renton je dispono. Krom la rento de kapitalo, la fondaĵoj ricevas ankaŭ donacojn por daŭrigi sian laboron.

La antaŭviditaj kaj disponeblaj sumoj en 2011 estas: por Afriko: € 4 550 (+ € 2 000 por la Afrika Oficejo), por Ameriko € 1 450, por Azio € 18 000. Fakte por Meza Oriento kaj Norda Afriko kaj Oceanio ne ekzistas jam propraj fondaĵoj, pro kio ili rekte dependas de ĉiujaraj donacoj. Eŭropa Fondaĵo ja ekzistas, sed ĝi apenaŭ havas monon.

Kiel vi povas kompreni, temas pri relative malgrandaj sumoj, kiuj tamen ebligis tiom da laboro. UEA nun ĉiam pli decide intencas helpi pere de la regionaj komisionoj la disvastigon de Esperanto en la tuta mondo. Tion ni povos fari nur per via helpo. Se vi deziras subteni la agadojn de tiuj komisionoj, vi povas sendi mondonacon al la komisiono(j) de via elekto, pagante al UEA laŭ la kutimaj pagmanieroj kaj indikante al kiu komisiono vi volas donaci.

Loes Demmendaal

La Eta Princo parolas Esperanton

La Eta Princo. Antoine de Saint-Exupéry. Trad. de Pierre Delaire. Tria reviziita eldono. Kanada Esperanto-Asocio kaj Espéranto-France, 2010. 93p. 23cm. Ilus. Bind. ISBN 9782950737656. Prezo: € 12,60

La Eta Princo vizitis min unuafoje, kiam mi estis gimnaziano. Tiam la libro ŝajnis al mi tajlorita ĝuste por mia aĝo, kaj fascinis min precipe la humuraj priskriboj de la strangaj solecaj aliplanedanoj, kiujn la Eta Princo vizitis: la reĝo pensanta ke li regas super ĉio, la malmodestulo pensanta ke ĉiuj aliaj homoj devas admiri lin, la ebrulo drinkanta por forgesi ke li hontas drinki, la negocisto pensanta ke li posedas la stelojn kiujn li kalkulas, la lanternisto pensanta ke li estas devigata lumigi kaj estingi ĉiuminute senutilan stratlanternon (“ĉar nun [la planedo] turniĝas unu fojon ĉiuminute, mi ne plu havas eĉ sekundon por paŭzi. Mi lumigas kaj estingas unu fojon ĉiuminute!” – li klarigas) kaj la geografo pensanta ke li bezonas esploristojn, ĉar “geografo estas tro grava persono por vagadi”. Ĉiuj tiuj karikaturnaj protagonistoj pensigis min pri bone konataj plenkreskuloj, kiuj amase ĉirkaŭis min sur la planedo Tero kaj klopodis eduki min tiel, ke mi fariĝu ilia subulo, aŭ admiranto, aŭ kompatanto, aŭ esploristo... Ankaŭ la negocisto kaj la tro sinofera lanternisto similis al plenkreskaj konatoj, prezentantaj al mi vivstilojn, kiujn mi ne admiris. La lanternisto eĉ pensigis min pri iu tre proksima de mi, kies vivon mi neniam volis imiti. Kaj kvazaŭ divenante miajn sentojn, la Eta Princo diris: “Tiu estas la sola, kun kiu mi povus amikiĝi. Sed lia planedo estas vere tro malgranda. Sur ĝi ne estas spaco por du personoj...” Mi sendube preferis kiel modelon la vivstilon de la aviadisto, kiu kapablis kompreni la dezirojn de la infanoj, admiris ĉiujn belaĵojn de la tero kaj ĝuis ankaŭ la solecan meditadojn en la dezerto...

Post nia unua renkontiĝo, la Eta Princo vizitis min ofte. Kiam mi patriniĝis, li eksemilis al mia filino. Intertempe, mi eksciis kelkajn detalojn pri la biografio de la aŭtoro, la kuraĝa aviadisto Antoine de Saint-Exupéry. Impresis min profunde la fakto, ke lia pli juna tre amata frato forpasis, kiam ili ambaŭ estis lernejoj. Mi komprenis, ke Saint-Exupéry verŝajne sentis sin mezvoje, inter la mondo de infanoj kaj tiu de plenkreskuloj, fronte al sia pli juna frato. Mi rimarkis, ke verŝajne same sentas sin la aviadisto de la rakonto fronte al la Eta Princo, kiam li diras al tiu ke la plenkreskuloj “neniam komprenas ion

ajn per si mem, kaj al la infanoj estas lacige ĉiam kaj ĉiam doni al ili klarigojn.” Impresis min ankaŭ la fakto, ke la aŭtoro verkis tiun rakonton post kiam li trapasis realan aviadilakcidenton en la dezerto Saharo kaj atendis tie kune kun alia aviadisto pli ol 3 tagojn, ĝis oni ilin savis. Tiam la verkisto suferegis pro soifo kaj malsato, tial li spertis halucinojn... Kaj la tuta libro fariĝis en mia menso pli-malpli (nur iusence!) rakonto pri reveno de spirito sur la teron, kvazaŭ la spirito de la pli juna frato vizitus la aviadiston por kuraĝigi lin en la dezerto. Kaj tiam, aparte emociis min la dialogo inter la Eta Princo kaj la venena serpento, kiu simbolas la morton:

– Mi povas konduki vin pli malproksimen ol ŝipo, diris la serpento.”

Kaj iom poste:

– Ho! Mi bone komprenis, diris la Eta Princo, sed kial vi ĉiam esprimiĝas per enigmoj?

– Mi solvas ilin ĉiujn, diris la serpento.”

Mi legis ankaŭ pri la tragedia morto de la aŭtoro en la aĝo de 44 jaroj, fine de la dua mondmilito, kiam li malaperis en milita misio super Mediteraneo. Kaj post kiam mi ricevis tiun informon, pli profundaj kaj eĥaj ekŝajnis al mi la adiaŭaj vortoj de la Eta Princo: “Kiam vi rigardos la ĉielon dumnokte, ĉar mi loĝos sur unu el la steloj kaj ridos sur unu el ili, tiam estos por vi, kvazaŭ ĉiuj steloj ridus. Vi havos stelojn, kiuj kapablas ridi!”

La Eta Princo vizitis min en diversaj vivetapoj, kaj ĉiufoje ŝajnis al mi ke ĝuste tiam mia aĝo estas la plej taŭga por lia vizito. Ĉiufoje mi malkovris novan tavolon de beleco meditante pri la sencoj de liaj vortoj. Ĉi-monate li denove vizitis min, sed ĉi-foje ni ambaŭ parolis... Esperanton! La tria, reviziita eldono de la Esperanta traduko de Pierre Delaire estas luksa libro, kies belkolorajn desegnojn (faritajn de la aŭtoro) mi ravate admiras nun, kune kun miaj genepoj.

Nur nun mi rimarkas, ke Saint-Exupéry prisilentas la lingvan problemon de la Eta Princo. Tio estas kutima taktiko de aŭtoroj kiuj verkas pri aliplanedanoj, spiritoj aŭ anĝeloj: ili ofte ŝajnas ignori la lingvan problemon de la fremda protagonisto (aŭ kelkfoje ili igas la protagoniston uzi aliplanedajn tradukilojn, sen ajna klarigo pri ilia



funkciado). Ekde la komenco, la Eta Princo tute nature alparolas la aviadiston en lia lingvo. Kiel li lernis la lingvon, kiam li troviĝis tute sola sur sia planedo? Kiel la reĝo, la malmodestulo k.a. lernis la saman lingvon? Tia ambigueco povas pensigi la leganton, ke eble la aviadisto havas halucinan vizion pri si mem kiel infano. La aviadisto kaj la Eta Princo divenas la pensojn unu de la alia ĝis iu punkto, do ili ja povus esti la sama persono, kvazaŭ la aviadisto vizitis sin mem tra tempotunelo...

Nun mi sentas kvazaŭ la Eta Princo fariĝus la enkorpigo de mi mem kiel infano. Kaj jen la dediĉo sur la unua paĝo kaptas mian apartan atenton. La aŭtoro dediĉas la libron

al unu el siaj plej karaj plenkreskaj amikoj, "kiam [tiu] estis malgranda knabo". Ĉu eble la aŭtoro fakte elpensis tiun libron, precipe por ke ni ĉiuj revidu mense nin mem "kiam ni estis malgrandaj knab(in)oj"? Tial mi havas nun la senton, ke la libro estas speciale tajlorita por mia nuna aĝo? La kioman fojon mi havas tiun ĉi senton? Ankaŭ miaj genepoj ŝajnas pensi, ke la rakonto taŭgas ĝuste por iliaj malsamaj aĝoj...

La Esperanta versio de *La Eta Princo* estas flua kaj tre agrable legebla. Mi tutkore rekomendas ĝian legadon al ajna esperantisto sendepende de la aĝo.

Luiza Carol

Leginda en, sur, apud, ĉe, sub... la lito

Rakontoj sub la lito. Antoaneta Klobučar. El la kroata trad. Davor Klobučar. Ilustris Ana Klobučar. Osijek: Liberiga stelo, 2004. 120p. 20cm. ISBN 953980812X. Prezo: € 9,90

Jen ĉarma libro por junaj legantoj kaj homoj, kiuj sentas sin junaj. Temas pri dek ok mallongaj rakontoj "sub la lito" pri tre malsamaj bestoj. Inter la plej malgranda, la eta formiko, kaj la plej granda, la elefanto, ni renkontas plej diversajn mambestojn, plej variajn birdojn kaj plurajn aliajn. Tiuj besto-infanoj aperas preskaŭ ĉiam kun Panjo kaj Paĉjo kaj en sia natura medio, kie ili lernas la ĉiutagan vivon – kaj ni, la scivolaj legantoj, kune kun ili. Vere originala estas la disdivido en tri partojn: Aventuroj ravaj, Familioj gravaj kaj Instruoj pravaj, kiuj bele harmonias kun la tuta enhavo de la libro. Ĉiuj bestoj ricevis ĉarmajn nomojn (tre belaj solvoj en Esperanto!): ekzemple, Miaŭĉjo, Plaĉjo, Stulĉjo, Timemulino kaj similaj aliaj.



Aparte ĉarmaj kaj vere admirindaj estas la belaj koloraj bildoj, faritaj de la 12-jara filino de la aŭtorino, kiuj trafe ilustras la interesajn rakontojn. Sola manko de tiuj bildoj estas, ke ili ĉiuj estas inverse prezentitaj, ol ni kutimas tion el aliaj libroj.

La lingvaĵo estas – preskaŭ – senriproĉa, se oni ne konsideras kelkajn malglataĵojn. Ekzemple necesas ĝuste dividi vortojn tiel: for-iris, trans-iris, sed ne fo-riris, trans-iris, kio ĝenas la fluan legadon. Mi trovis malmultajn aliajn erarojn, ekz. tiun, ke nepre oni devas ŝmiri farbon sur sian vestaĵon. Infanlibro bezonas aparte atente man kontroladon!

Entute tre rekomendinda legaĵo, ne nur por infanoj...

Nora Caragea

UEA ricevis saketojn, sakojn, skatolojn kaj albumojn

Temas pri poŝtmarkoj. En la Dua Bulteno de la 96-a UK en Kopenhago estis alvoko kunporti uzitajn poŝtmarkojn. La rezulto estis du grandaj libroskatoloj plenaj de ili.

Nia komisiito Bertus Demmendaal (sur la foto) bezonas certe monatojn por trarigardi ilin, apartigi la vendeblajn markojn, foje malglui ilin kaj proponi en roterdamaj filatelistaj rondo.

Aparte granda laboro estos unuavice katalogi polajn albumojn de freŝaj kaj stampitaj poŝtmarkoj, kiujn donacis s-ino Joanna Sidorak.

Dum la lastaj du jaroj la venditaj poŝtmarkoj venigis ĉ. 700 eŭrojn al UEA. Per tio eblas nun reeldoni la plenkoloran membrovarbilon de UEA.

Al ĉiuj donacintoj koran dankon!

Loes Demmendaal



LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke por varoj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio al ilia neta prezo aldoniĝas aldonvalora imposto: 6% por libroj kaj periodaĵoj kaj 19% por ĉio alia. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimume 4,00 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe www.uea.org/katalogo/.

Aboco. Penelope Vos kaj lernantoj. Candel: Mondeto, 2011. 32p. 21cm. ISBN 9780987062208. Plenkolora "faldlibro" por instrui la Esperantan alfabeton al infanoj. € 18,60

Beletra Almanako 11. (Junio 2011). Red. J. Camacho, P. Daŝgupto, I. Ertl. Novjorko: Mondial, 2011. 157p. 22cm. Ilus. ISBN/ISSN 9781595692207/19373325. Prozo, poezio, eseoj kaj artikoloj (originalaj kaj tradukitaj), leteroj kaj recenzoj. € 9,90

Ĉio en ordo / Wszystko w porządku. Zbigniew Patryk. El la pola trad. T. Chmielik, L. Ligęza. Białystok: Książnica Podlaska im. Łukasza Gónickiego, 2011. 60+60p. 20cm. Dulingva: pola, E. ISBN 9788360368596. Modernaj, liberformaj poemoj. € 8,70

Elemente de esperanto por românofoni. Ionel Oneț. Sfântu Gheorghe: Charta, 2011. 49p. 20cm. ISBN 9789738326767. Elementoj de gramatiko (kaj ne nur) kun ekzemploj kaj klarigoj por rumanlingvanoj. € 4,50

Epizodoj. Lode Van de Velde. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2011. 57p. 21cm. ISBN 9782918300557. Diversspecaj, diversformaj, diverstemaj poemoj verkitaj dum la periodo 1998-2008. € 7,50

Esperanto: komenco, aktualo kaj estonteco. Aktoj de la 33-a Esperantologia Konferenco en la 95-a Universala Kongreso de Esperanto, Havano 2010. V. Benczik, H. Tonkin, S. Štimec, Ch. Kiselman, A. Wandel. Red. Christer Kiselman. Rotterdam: UEA, 2011. 116p. 30cm. Ilus. ISBN 9789290171157.


Tekstoj de kvin prelegoj. € 15,00. Triona rabato ekde 3 ekz.

Florilegium Interlinguisticum. Festschrift für Detlev Blanke zum 70. Geburtstag. Div. aŭtoroj.

Red. Cyril Brosch kaj Sabine Fiedler. Frankfurt am Main: Peter Lang, 2011. 424p. 22cm. Germanlingva. Bind. ISBN 9783631613283. 22 eseoj de 22 aŭtoroj traktantaj (inter)lingvistikajn temojn. € 81,60


Gaston Waringhien, président de l'Académie d'Espéranto, poète, lexicographe, grammairien, traducteur, conférencier. André Cherpillod. Courgenard: La aŭtoro, [2001]. 12p. 21cm. Franclingva. Teksto de prelego farita en 2001. € 1,50

Hieraŭnokte mi revis pri paco. Taglibro de Dang Thuy Tram. Dang Thuy Tram. El la vjetnama trad.



kollektivo. Hanojo: VEA, 2011. 376p. 20cm. Ilus. ISBN 9786046900009. Taglibro de vjetnama kuracistino, pereinta en la usona milito kontraŭ Vjetnamio. € 15,00

Internacia Kongresa Universitato 2011. Kopenhago, Danio, 23-30 julio 2011. Red. A. Wandel. Rotterdam: UEA, 2011. 137p. 30cm. Ilus. Prelegoj de A. Wandel, E. Boyadzhieva, T. Sadan, E. Høg, Kadoja H., J.A. Vergara, D. Astori, V. Barandovská-Frank, J. Nordfalk. € 15,00. Triona rabato ekde 3 ekz.



Kato Koloro / Kot Kolor / Colour the Cat / Die Katze, die hieß Farbe. Moises Gutierrez Raimundez. Ilustraĵoj de Renata Kaczyńska-Łuba. En Esperanton trad. P. Wierzbowski. Białystok: PRO100, 2011. 20p. 31cm. Bind. Kolorilus. Kvarlingva eldono (E, pola, angla, germana). ISBN 9788393162505. Kortuŝa historio de blinda vaganta kato. € 11,40

Lexicon silvestre (Prima pars). Vortaro de forsta fako / Wörterbuch des Forstwesens. Red. Stefan Panka. Eberswalde: Lexicon silvestre, 2010. 297p. 30cm. ISBN 9783931262693. Pli ol 1 000 terminoj en Esperanto kaj la germana, kun difinoj en ambaŭ lingvoj. € 31,80

Loĝi en homaj lingvoj: la substancisma perspektivo. Probal Dasgupta. Novjorko: Mondial, 2011. 243p. 22cm. ISBN 9781595692146. Monografio vestita kiel prediko rekomdanta, ke la filozofoj uzu Esperanton kiel koncepto-klarigan lingvon. € 15,00

Mia stelo. Felicja Raszkin-Nowak. En Esperanton trad. T. Chmielik, L. Ligęza. Białystok: Książnica Podlaska im. Łukasza Góńickiego,

2011. 189p. 24cm. Ilus. ISBN 9788360368718. Membiografio de pollanda judino (la nevino de la bjalistoka esperantisto Jakobo Ŝapiro), saviĝinta el la Holokaŭsto, nun vivanta en Danio. € 15,60

Origino de la vivo sur la Tero. Nikolao Gudskov. Enkonduko de Amri Wandel. Moskvo: Impeto, 2011. 79p. 20cm. Ilus. ISBN 9785716102248. Atentokapta popularsciencia verko. € 8,10

Pasporta Servo. La listo de gastigantoj de TEJO, 2011. Rotterdam: TEJO, 2011. 188p. 15cm. Mapoj. ISSN 18797598. Kun 1087 adresoj en 90 landoj. € 9,00. Triona rabato ekde 3 ekz.

Pri Dinjo, Diko kaj aliaj estaĵoj. Instrua noveleto por la progresiga E-kurso. Mikaelo Bronŝtejn. Moskvo: Impeto, 2011. 60p. 20cm. Kun desegnaĵoj. ISBN 9785716102262. € 6,00

Profiloj de Suno kaj Luno. Miriam Rodríguez Hernández. Desegnaĵoj de Danny Daniel Perera Gutiérrez. El la hispana trad. J. de Jesús Campos Pacheco. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2011. 27p. 15cm. ISBN 9782918300465. Liberformaj poemoj akompanataj de nigrablankaj desegnaĵoj. € 4,10

Rapport du professeur François Grin, Le, de l'université de Genève, sur le problème de communication en Europe. André Cherpillod. Courgenard: La aŭtoro, [2005]. 16p. 21cm. Teksto

de prelego franclingva. € 0,90

¿Sabe usted Esperanto? Jorge Hess. Buenos Aires: deauno.com, 2011. 184p. 21cm. Ilus. ISBN 9789871581948. Populara 20-leciona lernilo; kun aldonaĵoj. Por hispanlingvanoj. € 7,50

Sojlo de la spirita mondo, La. Aforismaj prezentoj. Rudolf Steiner. El la germana trad. W. Nüesch. Berno: La tradukinto, 2011. 70p. 21cm. Priskriboj de tiuj partoj de la mondo kaj de la homa naturo, kiuj estas vidataj, kiam la spirita ekkono transpaŝas la limon, kiu disigas senseblan mondon kaj spiritomondon. € 3,90

Tertrema katastrofo de Japanio 2011. Taglibro. Jasuo Hori. MAS / SAT, 2011. 165p. 21cm. Ilus. ISBN 9782918300564. Pli ol simpla taglibro! € 14,10

Tohtori Zamenhof ja kansainvälinen kieli. Leif Nordenstorm, Christer Lörnemark, Aleksandr Korženkov. Antaŭparolo de Daniel Tarschys. En la finnan trad. T. Grundström. Helsinki: Suomen Esprantoliitto, 2011. 146p. 21cm. ISBN 9789528929033. Prezento de Esperanto kaj ĝia aŭtoro. € 15,00

NELIBROJ

Ekskurso al mondo fino. Roman Dobrzyński. Varsovio: MOviDO, 2011. 30min. Raporto pri krozado de esperantista grupo ĉirkaŭ Sud-Ameriko ĝis la Horna Kabo. DVD. € 9,00

Glumarko Hanojo. La 97-a UK, Hanojo – Vjetnamio, 28 julio – 4 aŭgusto 2012. Rotterdam: UEA, 2011. Folio (8x14cm) kun 10 glumarkoj. € 1,20 / folio. Triona rabato ekde 3 folioj.

Hiphopa kompilo. Volumo 2. Donneville: Vinilkosmo, 2011. 51min. Kun akompana broŝuro. Kompilaĵo de 17 pecoj, al kies realigo kontribuis muzikistoj kaj bandoj el deko da landoj. KD. € 16,80

Plena verkaro de L. L. Zamenhof: La preparado de la Bulonja kongreso. Carlo Bourlet kaj La revuo. 1917, forpasis nia Majstro. Dum militaj esperoj. Tokyo: Libroteko Tokio, [2011]. Nove elfositaj kvar dokumentoj, kompilitaj de Ludovikito por pliampleksigi PVZ. Pretigitaj (komposte aŭ fotokopie), kiel la aliaj volumoj en la serio. Sume 1049p. En formato PDF. Komputila KD. € 12,00



En la rubriko *Laste aperis* menciigis nur tiuj varoj kiuj estas aĉeteblaj de la Libroservo de UEA, kaj kiuj ne menciigis antaŭe en tiu ĉi rubriko.

Ni petas eldonantojn de esperantaĵoj sendi al la Libroservo specimenojn de siaj eldonaĵoj kaj informojn pri prezoj, rabatoj, sendokostoj.

KOTIZTABELO DE UEA POR 2012

La jenaj tarifoj validas ankaŭ por postaj jaroj, se la pago estos farita antaŭ la 30-a de septembro 2012.

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	14	34	85	51	31	170
Aŭstrio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Belgio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Brazilo/eŭro	5	12	31	19	11	62
Britio/pundo	8	21	52	33	20	104
Ĉeĥio/krono	170	420	1050	670	400	2100
Danio/krono	70	180	450	285	170	900
Estonio/eŭro	7	17	42	27	16	84
Finnlando/eŭro	10	25	61	38	23	122
Francio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Germanio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Greklando/eŭro	8	20	50	32	19	100
Hispanio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Hungario/forinto	1750	4400	11000	7000	4200	22000
Irlando/eŭro	10	25	61	38	23	122
Islando/eŭro	10	25	61	37	22	122
Israelo/eŭro	7	18	46	28	17	92
Italio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Japanio/eno	1120	2800	7000	4200	2520	14000
Kanado/dolaro	13	34	84	50	30	168
Latvio/lat	4	11	27	17	10	54
Litovio/lido	20	50	130	80	50	260
Nederlando/eŭro	10	25	61	38	23	122
Norvegio/krono	75	190	470	280	170	940
Nov-Zelando/dolaro	18	44	110	66	40	220
Pollando/zloto	26	64	160	100	60	320
Portugalia/eŭro	8	20	50	32	19	100
Rusio/eŭro	5	12	31	19	11	62
Slovakio/eŭro	7	17	42	27	16	84
Slovenio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Svedio/krono	88	220	550	350	210	1100
Svislando/franko	12	30	75	45	27	150
Usono/dolaro	13	32	80	48	29	160
TARIFA A/eŭro	6	16	41	25	15	82
TARIFA B/eŭro	5	12	31	19	11	62

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgo laŭ Belgio; Kipro kaj Malto laŭ Slovenio.
TARIFA A: Bahamoj, Honkongo, Korea Respubliko, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFA B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

MG: Membro kun Gvidlibro kaj monata reta novajbulteno.

MJ(-T): Membro kun Jarlibro kaj la revuo *Esperanto* rete (kaj ĝis inkl. 29 jaroj membro en TEJO kun *Kontakto* sen plia pago).

MA(-T): Membro-Abonanto kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto*.

DM(-T): Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon *Kontakto*.

DMJ(-T): Dumviva Membro kun Jarlibro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MJ; ricevas la Jarlibron kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membrecon en TEJO kun *Kontakto*.

SA: Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA.

Kto: Abono al la revuo *Kontakto*, sen la membreco en UEA/TEJO.

SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA).

PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO.

DUMVIVAJ MEMBROJ:

Brazilo: M.G. Alves da Silva. Svislando: R. Bachmann Nüesch.

SOCIETO ZAMENHOF:

Belgio: C. Bracke, K. Lödör. Francio: C. Longue-Épée. Germanio: A. Kronenberger. Japanio: Y. Hori. Korea Respubliko: Y.M. Kim.

DONACIOJ

Ĝis la 15-a de septembro:

Ĝenerala Kapitalo: Usono: M.L. Barkley (heredaĵo) 1 581,96.
Sumo ĉi-jara: 1 581,96.

Kapitalo Afriko: Japanio: Kokosa Klubo 1 291,67. *Sumo ĉi-jara*: 1 933,75.

Konto Afriko: Nederlando: C. & R. Bossong 75,00. Svedio: H. Dahl 500,00; J. Hammarberg 43,98. *Sumo ĉi-jara*: 6 674,25.

Fondaĵo Ameriko: Britio: M. Joshi 11,49; M. Sims 45,98. Svedio: J. Hammarberg 65,89. *Sumo ĉi-jara*: 842,36.

Fondaĵo Azio: Japanio: S. Aikawa, H. Takahasi – po 35,64; A. Aoyama, T. Koyama, T. Lin, Y. Oozato, Y. Ueno, Miyazaki E-Soc. – po 17,82; H. Gotoo 51,42; Y. Gotoo, S. Miyamoto, E-Ligo de Sikoku – po 17,14; T. Huzita, M. Nakatu – po 26,73; M. Isino 35,74; I. Katoo 26,88; T. Takehana 21,41. *Sumo ĉi-jara*: 1 445,11.

Fondaĵo Canuto: Britio: H. Chapman 6,71. Japanio: G. Kimura 20,00. Luksemburgo: Klára Ertl 5,00. Nederlando: R. Moerbeek 100,00. *Sumo ĉi-jara*: 4 172,32.

Konto Espero: Israelo: K. Sicherman 120,00. Japanio: G. Kimura 20,00. *Sumo ĉi-jara*: 826,05.

Fondaĵo Junularo: Danio: M. Lins 20,00. *Sumo ĉi-jara*: 145,00.

Volontula Fondaĵo: Danio: M. Lins 20,00. Aŭkcio dum la 96-a UK: 1 481,74. *Sumo ĉi-jara*: 1 551,74.

Konto Wŭster: Svedio: H. Dahl 500,00. *Sumo ĉi-jara*: 500,00.

Konto Propagando: Danio: M. Lins 20,00. *Sumo ĉi-jara*: 20,00.

Konto Oficeja ilaro: Danio: M. Lins 20,00. *Sumo ĉi-jara*: 133,92.

Libroj por Vjetnamio: Kongresanoj de la 96-a UK: 1 480,41. Danio: E. Kehlet 100,00. *Sumo ĉi-jara*: 1 580,41.

Ĝenerala kaso: Nederlando: G. Gerritse 20,00; J. Niemans 68,00. *Sumo ĉi-jara*: 1 435,06.

Al ĉiuj koran dankon! UEA

Partizánske: Ĉu plia Esperanto-urbo?

La okcidentslovakia urbo Partizánske havas nur 25 mil enloĝantojn, sed inter la esperantistoj ĝi estas tre bone konata. Lastatempe tion komencis rimarki ankaŭ la urbaj instancoj, kaj se ilia favoro daŭros, la konata Esperanto-urbo Herzberg eble baldaŭ havos paralelon en Slovakio.

Peter Baláž, loĝanto de Partizánske, aktivas por Esperanto jam ekde 2003, kaj la internacia Esperanto-organizo E@I (Edukado@Interreto), kies agadon li kunordigas, estas ekde la jaro 2005 registrita ĝuste tie. Ekde tiam multaj libroj, diskaj kaj dosieroj eliris el la urbo, same kiel multaj esperantistoj venis al ĝi por ĉeesti seminarion aŭ kunsidon.

Plej laste, ekde la 1-a de julio 2011, en Partizánske situas la oficejo de E@I, ĝia unua fizika sidejo. Temas pri ejo de 60 m², en la urbocentro, tuj malantaŭ la urbodomo. La urbodomo ankaŭ estas tiu kiu ebligis la realigon, disponigante la ejon kontraŭ simbola unu eŭro jare.

En la oficejo, kiun necesis plene farbi kaj ekipi per meblaro, nun troviĝas laborlokoj por 5 personoj. Tiuj efektive pleniĝis dum la somero, kiam en Partizánske vivis kaj staĝon ĉe E@I faris samtempe tri junaj esperantistoj: Matthieu Desplantes el Francio, Juan Diego Díaz Bautista el Hispanio, kaj Miroslav Hruška el Ĉeĥio. Kun helpo de E@I kaj laŭ la antaŭa ekzemplo de Marek Blahuš el Francio, ili ĉiuj sukcesis atingi stipendion per la EU-programo Erasmus, pro kio ilia kelkmonata helpo estis por E@I senpaga.

Subteno de la urbo kaj precipe de ĝia urbestro Jozef Božik, kiu persone konfirmis sian apogon al Esperanto okaze de akcepto de E@I-teamo en aŭgusto, malfermas novajn ŝancojn por Esperanto en Partizánske. Aldone al la jam okazantaj kursoj antaŭvideblas plia videbligo de Esperanto kaj E@I jam nun



La ĝisnunaj staĝantoj de E@I (de maldekstre: Miroslav Hruška, Juan Diego Díaz Bautista, Marek Blahuš, Salomé Hug kaj Matthieu Desplantes.

serĉas novajn staĝantojn, kiuj estonte povos venadi ankaŭ por pli longa tempo per la Eŭropa Volontula Servo (EVS). Laboro ne mankos, i.a. ĉar post la sukcesa *Slovakie.eu* ĵus akceptiĝis nova dujara projekto subvenciata de EU, kun buĝeto de 485 857 EUR kaj 8 partneroj en 6 landoj, ĉi-foje kun la celo rete instrui la germanan lingvon.

Marek Blahuš

Kongreso de Esperanto en Italio

Sunplena, bunta kaj alloga: jen tri adjektivoj por priskribi la ĵusan kongreson de Esperanto en Italio (Torino, 20-27 aŭgusto 2011).

Tamen mi ne intencas tedi vin per kutima aplaŭda raporto pri renkontiĝoj. Mi volas analizi kelkajn aspektojn kun vi, por vidi kion kaj kiel elpreni por venontaj aranĝoj, tiel ke ili estu ankoraŭ pli mojosaj¹ kaj fruktodonaj. Do, jen miaj konsideroj:

La inaŭguro

Ĉi-jare la inaŭguro estis aparte grava. Salutis homoj el 26 landoj kaj el 5 kontinentoj (Afriko, Azio, Eŭropo, Norda Ameriko, Suda Ameriko), montrante buntan partoprenantaron. La ĉefparolado de Probal Dasgupta, prezidanto de UEA, ravis la aŭskultantojn per informoj kaj anekdotoj pri la tradukado de fabeloj por infanoj, projekto financita de EU. Li montris kiel Esperanto povus utili por faciligi la redonon de la konceptoj inter tre malsamaj lingvoj apartenantaj al malsamaj kulturoj. La inaŭguron partoprenis ne nur esperantistoj, sed ankaŭ aŭtoritatuloj,

kio ne estas tiom kutima por nacia kongreso. Reprezente de Torino, la gastiga urbo, venis la skabeno Ilda Curti, kiu bonvenigis la kongresanojn kun tre favora sinteno al Esperanto. Plej verŝajne por la unua fojo la urbestro de la venonta Kongreso de Esperanto en Italio partoprenis la inaŭguron. Temas ja pri specialaĵo: Mazara del Vallo, sicilia urbo, sin proponas esti ĉefurbo de Esperanto en Mediteraneo. La urbestro Niccolo' Cristaldi, ankaŭ nacia deputito, tute favoras al Esperanto, kaj disponigis al Itala E-Federacio sidejon en la Muzeo de Lauleĝeco por konstrui tie Centron pri Interkulturo kaj Esperanto. La urbestro estis aparte varma kun la esperantistoj, kaj restis en la kongresejo ankaŭ post la inaŭguro, por plubabili pri la planoj enkonduki Esperanton en Mazara del Vallo.

Kion ni lernis: ni ne devas timi inviti aŭtoritatojn kaj interrilati kun ili. Foje la afero funkcias, foje ne. Sed se ni ne provas, ni neniam atingos ion ajn!

La tema programo

Du ĉefaj seminarioj okazis, plus pluraj aliaj prelegoj kaj programeroj. Estas aparte rimarkinde ke la seminario pri Eŭropo ricevis subvencion de Eŭropa Unio, kiu permesis aranĝi altkvalitan programon kaj helpi la partoprenon al la kongreso de pluraj homoj. Bertrand Hugon gvidis pasie kaj profesie la seminarion, kaj ĉiam abunda estis la publiko. Paul Gubbins gvidis la duan seminarion pri Esperanto-teatro, kaj laŭ la komentoj de la partoprenintoj ĝi estis ege sukcesa.

Kaj certe estas menciinda la prelegserio de Davide Astori, kiu eksperimente okazis nokte, post la koncertoj. Estis vere nekredeble kiom da homoj estis en la ĉambro, noktomeze, por aŭskulti pri Zamenhof, profeto de Eŭropo...

Kion ni lernis: la E-movado havas eblojn ricevi subvenciojn por financi siajn agadojn. Ni ne devas timi, sed male spertiĝi, provi kaj fine sukcesi!

La tema programo ĉi-jare estis ĉefe kleriga. Ni planas aranĝi ankaŭ trejnseminaron por la venonta kongreso en Mazara del Vallo, por utiligi pli bone la eblojn kaj oferti ĉiam pli buntan kaj allogan programon. Kaj, kiel la eksperimento de Davide Astori montris, ni ne timu eliri el fiksitaj skemoj!

La arta programo

Ĉiun vesperon okazis koncerto, krome du teatraĵoj dumtage surscenejgis kelkajn el la plej lertaj artistoj el la tuta E-movado. Koncertis Kaj Tiel Plu, Martin Wiese, Manuel Rôvere, Asorti, Reverie kaj Kajto. Eblis spekti la elstarajn teatraĵojn: "Dek tagoj de kapitano Postnikov" kaj "Roma Triptiko", kio tute bone ligiĝis al la temo de la seminario pri teatro.

Kion ni lernis: el la organiza vidpunkto, ni devas atente zorgi pri la teknikaj rimedoj bezonataj de la artistoj. Ĉio iris glate, sed nur danke al lastminuta streĉo de LKK :-). Estas iom bedaŭrinde ke ni fine devis rezigni pri surplacaj publikaj koncertoj, pro neantaŭvidita plialtiĝo de kostoj. Ni certe venontjare aranĝos la vesperan programon en Mazara publike, por dissemi Esperanton per arto inter la loĝantaro.



La konatiĝo kun la loko

Dek diversaj ekskursoj montris al la scivolemuloj gravajn lokojn historiajn, kulturajn kaj turismajn. Eĉ simple la kongresurbo Torino montriĝis multe pli kolorplena, plaĉa kaj vivinda ol antaŭsupozite. Aparte popularaj estis la ekskursoj al Lago Maggiore kaj al la Religia Torino.

Kion ni lernis: ĉiuj ekskursoj elĉerpiĝis baldaŭ. Ni antaŭvidas ke en Sicilio venontjare la interesiĝo estos eĉ pli granda. Eble ni devas pristudi iun postkongreson por proponi kelkajn tagojn al tiuj kiuj volas koni pli bone la lokon kaj la mirindan mediteranean insulon, sen maltrafi signifan parton de la kongreso.

Rilatoj kun la ekstera mondo

Krom la inaŭguro estis pluraj aliaj ebloj, en kiuj aŭtoritatuloj partoprenis aŭ en kiuj esperantistoj intermiksiĝis kun la lokanoj.

La verda foiro okazis surstrate, kun prezento de dudeko da E-organizoj. Trifoje okazis publikaj prelegoj en filozofia kafejo, kiujn sekvis aperitivoj por la ĉeestantoj. Aparte menciinda estas la vizito de la vicministro pri transportado, Bartolomeo Giachino, kiu salutis la kongreson kaj kune kun Katalin Kováts disdonis sepdek KER-diplomojn al Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia (rezultoj de la ekzamensesio en la kongreso en São Paulo). Kaj, parolante pri KER, memkompreneble okazis ekzamensesio ankaŭ en la Itala Kongreso, kiun vizitis eĉ oficialuloj de ITK.

Kion ni lernis: unue, kiel konate, por ke la lingvo estu internacia, ne sufiĉas nomi ĝin tiel. Same pri publikaj eventoj: necesas en la estonteco multe pli labori kaj varbi loke por altiri homojn al niaj publikaj aranĝoj. La ĉeesto de vicministro al Esperanto-kongreso estas aparte ĝojinda. Kvankam ĝi realiĝis pro serio da koincidoj, tio montras ke nia agado estas serioza kaj rekonata de la instancoj.

Finaj rimarkoj

La Kongreso de Esperanto en Italio multe evoluis en la lastaj jaroj: la partoprenantaro enorme kreskis, plejmulto el ĝi ne plu estas itala, la programo estas riĉa kaj abunda. La kongreso en Torino reprezentis mejloŝtonon por Itala E-Federacio kiu indikas vojon entreprenindan.

Por la unua fojo ni sukcesis ricevi nebagatelan subvencion, kaj ni plu esploras la eblon financi nian agadon per aliaj monfontoj ol la poŝoj de la membroj.

Ni estas lanĉantaj novan Centron pri Interkulturo kaj Esperanto en la insulo Sicilio, en Mazara del Vallo, urbo kiu gastigos la venontan Kongreson de Esperanto en Italio, kaj kies urbestro partoprenis en la inaŭguro.

Pluraj esperantistoj jam interesiĝas veni por instrui la lingvon internacian al la loĝantaro antaŭ la kongreso. Kaj... ni jam ricevis preskaŭ cent aliĝojn por la venonta kongreso! Kion pri la via? Ni atendas vin en Mazara!
<http://kongreso.esperanto.it>

Francesco Maurelli

francesco.maurelli@esperanto.it

Daniel Biro-Walker (1956-2011) mortis la 9-an de septembro en Quetigny (Francio). Li estis fakdelegito pri edukado, helpis volontule al la Kastelo Grezijono, estis korektanto de *lernu. net* kaj kunorganizis multajn renkontigojn, staĝojn kaj kongresojn.

Klaus Böhnke (1933-2011) mortis la 24-an de aprilo en Lübeck (Germanio), kie li iam estis delegito kaj fakdelegito pri fervojoj.

Leendert (Leen) C. Deij (1919-2011) mortis la 31-an de majo en Ridderkerk (Nederlando). Li estis laborista e-isto, lerninta la lingvon en 1935, kaj atentinda poeto, kies plej grava poemo *Al la juda foririnto* estis akceptita al *Esperanta antologio* (1958). Presforme aperis liaj poemkolektoj *Fragmentoj* (1988), *Infaneske* (1997), *Koboldo Plumo* (2004) kaj *Du etuloj* (2004), kaj la dokumenteca rakonto *Aminda* (1997). Li verkis ankaŭ la himnojn de SAT kaj la Esperanta Civito. Multaj liaj artikoloj aperis i.e. en *Malgranda Revuo*, *Heroldo de Esperanto*, *Literatura Foiro* kaj *Femina*.



Fernand Ditacroute (1928-2010), individua membro de UEA ekde 1947 kaj iama delegito, mortis la 29-an de oktobro 2010 en Razac sur l'Isle (Francio).

Stanislaw Hochól (1935-2010), dumviva membro de UEA, forpasis la 14-an de septembro 2010 en Krzyż Wielkopolski (Pollando). Sacerdoto-psikologo, li iam

estis delegito kaj fakdelegito pri katolikismo kaj psikologio.

Neli Holevič (1946-2011) mortis la 27-an de aŭgusto en Amsterdamo. Ŝi naskiĝis en Bulgario kaj ekde 1988 vivis en Nederlando. Ŝi aktive helpis en la Afrika Agado de UEA dum multaj jaroj kaj ankaŭ en la starigo de la lernejo Instituto Zamenhof en Lomeo. Ekde 2001 ŝi estis senatano de la Esperanta Civito.

Magomet I. Isajev (1928-2011) forpasis la 20-an de junio en Moskvo.

Membro de la Rusia Akademio de Naturaj Sciencoj, li estis fakulo kaj aŭtoro de pluraj libroj pri iranaj lingvoj kaj socilingvistiko. Li esperantistiĝis en 1956 kaj gvidis interlingvistikan grupon en la Instituto de Lingvoscienco en Moskvo. De 1979 ĝis 1989 li estis prezidanto de Asocio de Sovetiaj E-istoj. Krom artikoloj pri E-o kaj interlingvistiko, li redaktis la librojn *Problemy interlingvistiki* (1976) kaj *Problemy mejdunarodnogo*



vspomogatel' nogo jazyka (1992), kaj verkis la lernilojn *Jazik esperanto* (1983) kaj *Učebnik jazyka esperanto* (kun M. Semjonova; 1984).

Jan Książek (1951-2011) mortis la 17-an de aŭgusto en Piotrków Trybunalski (Pollando). Profesie kemiisto, li estis ĉefdelegito kaj kotizperanto de UEA ekde 2002, prezidanto de la filio de Pola E-Asocio en sia urbo kaj iama membro de la ĉefa estraro de PEA.

Paul Lafont (1936-2011) mortis la 11-an de julio en Rilhac-Rancon (Francio), kie li estis delegito.

Michael Leev (1918-2011) forpasis la 6-an de marto en Jerusalemo. Li naskiĝis en Ukrainio kaj en 1934 elmigris al Palestino. Li lernis E-on en 1982 per la koresponda kurso de E-Ligo de Israelo. Li estis longe delegito kaj fakdelegito pri la instruado de matematiko.

Jacques Tuinder (1933-2011) forpasis la 18-an de junio en Heemskerk



(Nederlando). Profesie li estis sociala laboranto, akompanante socimarĝenulojn en prizono kaj psikiatrie. Ekde 1966 li helpis vidhandikapitojn vivantajn en mizeraj cirkonstancoj en Afriko, Azio kaj Orienta Eŭropo. Memore pri la senpaga helpo de Zamenhof al malriĉaj vidhandikapuloj, li lanĉis la Agadon E3 ("Esperantistoj, esperigu esperantojn!"), poste daŭrigotan per la fondaĵo "Evidente". Unue li realigis la veturantajn okulklinikojn "Zamenhof" kaj "Esperanto" en Kenjo kaj Malavio, kaj okulhospitalon en Kameruno. Sekvis A-vitamin-projekto por vjetnamaj infanoj, agado por blindulternejo en Srilanko k.a. kampanjoj. Tuinder estis delegito kaj fakdelegito pri ekumenismo kaj porblindula helpo. Li estas la sola, kiu estis prezidanto kaj de la katolika IKUE (1966-1971) kaj de la protestanta KELI (2000-2004). La blindula asocio LIBE elektis lin honora membro, Esperanto Nederland aljuĝis al li la Verloren-van-Themaat-premion kaj la nederlanda reĝino kavalerigis lin en la Ordeno de Oranje Nassau.

Anoncetoj

Unu vorto = 1 €. Ni ne respondecas pri la enhavo. Ripeto ne rajtigas rabaton. Pri korespondpetoj zorgas ankaŭ Koresponda Servo Mondskala, B.P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio, www.multimania.com/kosomo.

Gvidlibreto por komitatanoj 2011 kaj ĉiuj scivoluloj pri la funkciado de la Komitato. Ĉapitro 1: Historiaĵoj de proponoj en la (sub)-komitato(j) pri reta membreco, membrovarbado, spezado de heredaĵoj, financado de taskoj de UEA, redakto- kaj komunikpolitiko, novaj fakaj asocioj, arĥaika elekto-proceduro en Havano kaj rezisto en la Estraro kontraŭ perinterreta voĉdonado. Ĉapitro 2: Spertulaj raportoj, kritikoj kaj proponoj de István Ertl ("Redakta politiko"), Martin Schäffer ("Ĉu UEA efike uzas nian monon?"), Johan Derks ("Kaŭzoj de komitata malforteco kaj ilia misuzado") kaj Renato Corsetti pri la Strategia Komisiono. Mendu rete tra <http://home.telfort.nl/derks.esp>.

Lernu la ĝojon kaj pacon de KRISTANISMO
Ni proponas senpagan studkurson.
Kursanoj ricevos Biblion senpage.
Internacia Biblio-misio
50 Wissage Road
LICHFIELD
ANGLIO WS13 6SW
dvdbddn@gmail.com
Bonvole skribu klare viajn nomon kaj adreson.

nenio plu estos la sama



VENIS la nova revuo **KONTAKTO**!

kontakto.tejo.org



Venontjare al Hanojo!

Glumarkoj (4x3cm) por la venontjara UK haveblas ĉe la Libroservo de UEA. 10-peca folio kostas €1,20. Triona rabato ekde 3 folioj.

ĈU VI SERĈAS KORESPONDAMIKON?

Sendu al *Koresponda Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj dezirataj, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu du internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. *KSM* transdonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. *KSM* estas servo de UEA.



Koresponda Servo Mondskala
B.P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio
www.multimania.com/kosomo

EKSKURSO TRA 100 JAROJ



Okaze de la 100-jariĝo de UEA aperis tiu ĉi abunde ilustrita libro de la renoma movada historiisto Ulrich Lins. Ĝi estas intereskapta enkonduko en la historion de UEA kaj kleriga legaĵo por ĉiu esperantisto. Krom ĝenerala historia trarigardo ĝi enhavas artikolojn pri Hector Hodler, la fondinto de

la Asocio, kaj pri Ivo Lapenna, la konstruinto de la moderna UEA. La libron kompletigas laŭjara kroniko, listoj de la prezidantoj, direktoroj kaj redaktoroj, kaj bibliografio.

UTILA ESTAS ALIĜO. Tra la unua jarcento de UEA. Ulrich Lins. Ilus. Rotterdam: UEA 2008. 126p. 24cm. ISBN 978 92 9017 105 8. Prezo: €15,00. Triona rabato ekde 3 ekz.

NUN KUN PLI BONAJ MAPOJ!

La plej populara eldonaĵo de TEJO, la listo de esperantistaj gastigantoj *Pasporta Servo*, aperas ekde 1974 kaj restas kiel unu el la plej elstaraj movadaj servoj. La nova eldono de 2011 enhavas 1087 adresojn en 90 landoj, sur 194 paĝoj.



La papera eldono estas mendebla kontraŭ 9 EUR + sendokostoj (kun triona rabato ekde tri ekz.) ĉe la Libroservo de UEA.


Por aliĝi kiel gastiganto, petu aliĝilon de la TEJO-oficejo aŭ de la landaj organizantoj.

Pliaj informoj ĉe pasportaservo@tejo.org.

Vizitu ankaŭ la novan retejon de PS:

www.pasportaservo.org

Legenda klasikaĵo



Vivo de Zamenhof de Edmond Privat estas klasikaĵo, kies vigla lingvaĵo kaj ĵurnalisme viveca rakontado ankaŭ hodiaŭ ravas la leganton same freŝe kiel ĉe ĝia unua apero en 1920. La nova eldono estas redaktita de Ulrich Lins, kiu provizis la verkon per ampleksaj klarigoj kaj font-indikoj.

Rotterdam: UEA, 2007. 171p. €9,00.
Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

iam kompletigota plena verkaro de l. l. zamenhof

Nova postrikolto finfine aperis!



Ĉirkaŭ mil paĝoj sur unu disko en formato PDF.
Kolektis kaj kompostis ludovikito.
Eldonis Libroteko Tokio en 2011.
Ĉe la Libro servo de UEA: €12.
Sesona rabato ekde 3 ekzempleroj.

Iudovikologia dokumentaro... bonpreza

- vol. 1. Unuaj libroj.** Unua volumo de la unuaj lernolibroj: fotoreproduktoj de la rusa, pola, franca, germana, angla (ambaŭ versioj) kaj sveda, plus la unuaj vortaretoj.
- vol. 2. Komenctempaj lernolibroj I.** Reprodukto de lernolibroj por germanoj, por angloj, por judoj en la jida, kaj por latvoj, el 1888-89.
- vol. 3. Komenctempaj lernolibroj II.** Reprodukto de lerniloj por danoj, bulgaroj, italoj, hispanoj, ĉeĥoj kaj litovoj, ĉiuj el 1890.
- vol. 4. Poŝaj lernolibroj.** Reprodukto de lernolibroj de Zamenhof, Geoghegan, de Beaufront k.a. el la jaroj 1890-98.
- vol. 5. Diversaj vortaroj kaj lernolibroj.** Lernolibroj por germanoj, rusoj, francoj kaj svedoj; vortaretoj hebrea, sveda kaj estona.
- vol. 6. Diverslingvaj broŝuroj.** La Dua Libro en la rusa; la Ekzercaro en la franca, rusa kaj pola; fruaj broŝuroj en la germana, franca, rusa, pola, portugala, nederlanda, angla.
- vol. 7. Legolibroj I.** Dek kvar eroj el "Biblioteko Internacia", inkluzive de kvin libretoj de Grabowski, vol. 1 de *Hamleto* kaj *La batalo de l' vivo*.
- vol. 8. Legolibroj II.** Dek sep eroj el "Biblioteko Internacia" (1895-97), de Kofman, Devjatnin, Gernet k.a.
- vol. 9. Ludovikaj adresaroj I (1889-1902).** Kun klariga "postbabilado".
- vol. 10. Ludovikaj adresaroj II (1903-09).** Reprodukto de postaj adresaroj, kaj de la rusa kaj germana originalaj eldonoj de la eseo *Elektio de la lingvo internacia*.
- vol. 11. Lingvo Internacia I.** Monata gazeto por la lingvo Esperanto. Jarkolektoj 1895-97.
- vol. 12. Lingvo Internacia II.** Jarkolektoj 1898-1900.
- vol. 13. Lingvo internacia III.** Jarkolektoj 1901-02.
- vol. 14. L'Espérantiste I.** Franclingva E-revuo, redaktita de Louis de Beaufront, kiu multe influis la publikan opinion de sia tempo. Jarkolektoj 1898-1900.
- vol. 15. L'Espérantiste II.** Jarkolektoj 1901-02.
- vol. 16. Spikumaĵoj I.** Lernolibroj, broŝuroj kaj beletraj tradukoj el 1888-96.
- vol. 17. Spikumaĵoj II.** Lerniloj por rusoj, estonoj, svedoj, hungaroj; francaj broŝuroj.
- vol. 18. Spikumaĵoj III.** Meza vortaro germana-internacia de Trompeter kaj Schmidt; *Tutmonda afero* de V.L. Kravcor; *Lernolibro por portugaloj* de Manuel Ribeiro da Costa e Almeida.
- vol. 19. Ludoviko kaj la inkunabloj.** Ĉiĉeronaj komentoj al la 118 "inkunabloj" aperintaj en "Iudovikologia dokumentaro".
- vol. 25. Invito al la ludovikologio I.** Red. Ludovikito. Kleraj "postbabiloj" al la volumoj aperintaj ĝis 1989.
- vol. 26. Invito al la ludovikologio II.** Red. Ludovikito. Kleraj "postbabiloj" al la volumoj aperintaj ekde 1989.

€7,50/vol. Sesona rabato ekde tri ekzempleroj de la sama titolo.